The majority of the Congress Members arrived about mid-day, and made their way at 2 o'clock to the *Akceptejo*. This was in the Guildhall, kindly placed at the disposal of the Esperantists for their annual gathering by the Mayor and Corporation. The Banqueting Room was reserved for *réunions*, and the actual *Akceptejo* was in No. 1 Committee Room. Here also were the offices of the Congress, with its group of busy workers, and tables covered with Esperanto literature and guide books, etc., relating to the City of Bath. In exchange for the Congress card, each member received a Congress button of modest dimensions, the Congress book having already been sent by post to each *aliointo*.

Very pleasant were the hours from 2—7.30 that the *Akceptejo* was open; here old friends and pioneers of the movement met again to compare notes on the progress of the propaganda, and to encourage each other in this year of unexpected difficulties. Here many of us met for the first time face to face those with whom we had been corresponding, or whose names we had learned through their works; here, also, the insatiable

book-lovers found new Esperanto works awaiting them, among them the long-expected "Edinburgh" Dictionary, and *Nova Sento*, the philosophical romance of Mr. Hyams, of Paignton.

RECEPTION BY THE MAYOR.

This was one of the most pleasant and appreciated items of the Congress programme. It began at 7.30, and was a joint reception to the Esperantists and the members of the National Association of Clerks to Insurance Committees, who were also meeting at Bath. The Mayor (Councillor F. M. SPEAR) and his daughter (Mrs. PAUL CHESTERMAN) received the guests in the Old Pump Room, arranged as a lounge, and tastefully decorated with palms and flowering plants. The company numbered more than 300, of whom at least two-thirds were Esperantists. The reception was also attended by several members of the Corporation and by many local residents. A short concert followed at 8 o'clock, in which Miss Hilda Blake sang songs in Esperanto and English, M. A. Vandervelde (of Antwerp) recited the monologue, "La Bela Songo," and Mr. H. Spackman's (of Corsham) violin solos were greatly appreciated. Immediately after this enjoyable little concert the MAYOR, in his elegant robes of office, gave us his official welcome. He expressed his pleasure that Bath had been chosen for this year's Congress, particularly as the city and its surroundings always looked their best at this time of the year. He was glad to see before him about 300 first-class advertising mediums—(laughter)—who would make Bath more widely known, and would be certain to return here again, either as residents or lodgers. He hoped that the visitors would all spend a pleasant and healthy holiday here. His Worship paid a tribute to Mr. Walter Pitt for his interest in Esperanto, and to the energy and enthusiasm of Mr. E. R. Blackett, one of the joint honorary secretaries of the Congress. He believed that Mr. Blackett actually thought in Esperanto. With regard to the idea of a world-wide language, he (the Mayor) believed in it absolutely. When this year was over, and when the War was over also, he might have the opportunity of perusing some of those books that the Secretary had sent to him. If he were a dictator, he should order one language for the world, but that tongue must be English (laughter and applause).

Mr. WALTER Pitt (the President of the Bath Society) responded in Esperanto. He thanked the Mayor for his welcome to the visitors, and expressed pleasure at the presence at that Congress of the representatives from Belgium. On behalf of the Bath Society, he welcomed the Congress to Bath.

Dr. J. POLLEN, C.I.E. (President of the Congress), replied in Esperanto and English. Alluding to the Mayor's suggestion that English should be accepted as the "world-language," he submitted that Esperanto would prove the medium through which this ultimate success of English might be attained. He remarked that their Congress had the patronage of the Duke of Connaught, the Bishop of Bristol, and the ex-Mayor of Bath (Dr. Preston King), in addition to the Mayor. He had received a letter* from the Bishop of Bristol, and another from Professor Gilbert Murray, the famous grammarian. Never, said Dr. Pollen, was Esperanto more urgently needed than at the present moment. The present crisis showed the need of some linguistic medium by means of which various nations could understand one another better, and develop the quality of mutual sympathy. Now, during war, it was their duty to prepare for peace—a peace which should prove a continuous, lasting peace. And this desired result would only be attained when nations understood one another.

Already, in the course of this distressing War, Esperanto had proved a great help in securing communication between different governments, and obtaining information concerning prisoners. Then he did not suppose that many present would care to study the Russian language. But after the War there would be a great opportunity for trade between this country and Russia, and here again Esperanto would provide a useful means of communication.

The company then returned to the Pump Room, where refreshments were served.

Another short concert followed, in which Mr. H. Spackman gave us violin solos, and Mr. Maurice Raynor, gifted with a pleasant, sympathetic voice, rendered "La Bandolero," of Leslie Stuart, and "Mia Fil," of Teresa del Riego, in a very agreeable manner, for which he was encored. F-ino Vermeulen, of Antwerp, recited very cleverly the monologue "Si ne legos ĝin." "La Brabançonne" and "God Save the King" were sung at the close.

Sunday, May 23.

DIVINE SERVICE IN ESPERANTO.

This service took place at 9.45 in St. James's Church. It was conducted by the Rev. J. Cyprian Rust, M.A., of Soham, and was very well attended, the body of the church being nearly filled. For reasons of health, Mr. Rust had been ordered to Bath by his doctor for an entire rest, but he nevertheless, with his usual energy and kindness of heart, decided once more to conduct the service for his *samideanoj*. After Litany, prayers, and hymns entirely in Esperanto, Mr. Rust, instead of a formal sermon, delivered a short address dealing mainly with the necessity for and efficacy of prayer, which we summarise as follows:—

Ni devas pensi dum tiu ĉi malfacila tempo pri nia aparta devo kiel Kristanoj, havantaj nur unu kredon, la kredon al Dio.

Ciu, kiu havas tiun kredon, kredas, ke Dio aŭdas niajn pregojn. Ni, do, pregu por la Reĝo, liaj regatoj, militantoj, soldatoj, ke Dio donu komforton al la mal-sanuloj kaj vunditoj, kaj konsolon al la malliberuloj. Pregu por la familioj de la mortigitoj, por la rifugintaj belgoj. Pro tio, ke ni batalas por la justeco, ke ni venku, ke Li donu pacon en nia tempo kaj ke ĝi daŭru. Ĉiuj povas pregi, kvankam ne ĉiuj povas batali.

La prego de justulo havas efikon, se li estas energio. Ni povas helpi per niaj pregoj; do ni, kiuj estas Esperantistoj, pregu por ricevo de Lia Sankta Spirito en tiu ĉi sankta sezono. Ne niaj vortoj, sed nia spirito havas efikon.

Mr. Montague C. Butler, L.R.A.M., of London, officiated at the organ, and played as a voluntary Mr. Harrison Hill's setting of "La Prego sub la Verda Standardo."

After the service the majority of the Congressists made short excursions, on foot or by tramcar, to the various outlying beauty spots of Bath. Probably the largest party made their way along the side of a hill, giving very fine views over the city, to the beautiful park on Beachen Cliff, where several photographs of the party were taken, and much *babilado* indulged in. Here we met for the first time our Russian samideanino, Mdme. Sujadinoff, who surprised us all by her fluency in Esperanto conversation, although this Congress was the first occasion on which she had heard Esperanto spoken in public, and conversed in it herself.

In the afternoon informal gatherings of Congressists took place in the Royal Victoria Park and other places of note in the neighbourhood, and in the evening there was a very fully attended social réunion in the Guildhall. This last proved to be in many ways perhaps the most

* See p. 123.

interesting meeting of the Congress, owing to the large number of short speeches on a great variety of subjects, and the many songs, recitations, and other items. Dr. Pollen presided, and in his own inimitable way succeeded in directing from the body of the hall to the platform a continuous stream of *talentuloj*. Our friend Ro So, Mr. R. Sharpe, of *Travivaĝoj* fame, played a selection of Norwegian airs on the pianoforte; M. A. Vandervelde (Antwerp) recited a couple of anecdotes; Mr. M. C. Butler spoke of the Esperanto Vegetarian Society, on behalf of its secretary, Mr. J. A. Gill, of Tunbridge Wells, now at the Front with the Friends' Ambulance Unit; F-ino Vermeulen (Antwerp) declaimed in masterly style Zamenhof's *La Vojo*. Mr. Warden, of Edinburgh, spoke of the abandonment of the Eleventh International Congress there, and of its acceptance by San Francisco, also of the proposed Summer School of Esperanto in Edinburgh. Mr. H. Spackman delighted us with a violin solo, and Mr. Harvey, of Edinburgh, with a couple of songs; Mdme. Sužadinoff, in an eloquent little speech, pleaded for the more general use of the word *Sinjorino* instead of *Fraŭlino* in addressing ladies, just as men, whether married or not, are always addressed "Sinjoro." Mr. Vandervelde sang with much emotion and patriotic fervour the celebrated Flemish song "Ho, Schelde," Dr. van der Biest accompanying at the piano. Mr. Relf gave us a fine performance of a pianoforte sonata of Beethoven. Dr. van der Biest heartily thanked the British Esperantists for the help they had rendered towards the expenses of the Belgian Congress; he announced that some sixteen of his countrymen had been enabled to be present. Mr. Rhodes, of Keighley, one of the pioneers of Esperanto in England, in a speech full of interesting particulars of the early days of the movement, first thanked Dr. van der Biest for his remarks, gracefully expressing the sense of honour which all British Esperantists feel in being able in any way to help their Belgian *samideanoj*. He recalled the fact that his first experience of the uses of Esperanto was in Belgium just eleven years ago. Mr. J. J. Boutwood, of Hastings, spoke of his experiences in the Belgian Congress last Whitsuntide in Malines. M. R. de Leener, Belgian student-soldier, and S-ro Kaplan, Russian *samideano*, of Bielstock, gave a short account of the lately-formed Students' Group in Cambridge University.

Monday, May 24.

The whole of Monday morning was occupied by the Annual General Meeting, of which we give a full report on page 125. Owing to the War we were deprived of the encouraging address and summary of the movement from our president, Mr. H. Bolingbroke Mudie, to which we have become accustomed during the past three years. We know that he is heartily with us in spirit, and would certainly have been present bodily if his military duties had in any way permitted it. Even at the last many of us would not have been surprised to see him suddenly appear on the platform; he would certainly have been pleased with the unanimity and enthusiasm which reigned throughout the meeting, especially with regard to the Guarantee Fund, his creation and special care.

In the afternoon the majority of members of the two Congresses took part in a delightful excursion and picnic to Limpley Stoke and Conkwell in splendid weather, if a trifle too warm.

In the evening a concert, open to the general public, was held in the Jubilee Hall. In spite of the fatigue of the afternoon's excursion it was well attended by the congressists. Dr. Pollen presided in his usual genial manner. Two pianoforte solos, Liszt's "Rhapsodie Hongroise" and a "Fantasia," by the Flemish composer, Benoit, were finely played by Mdme. Herman Steinmann, several songs in Esperanto and French by Mdme.

Laetitia Steinmann, and Miss Lilius Webb gave us all much pleasure with her three songs in Esperanto. M. A. Vandervelde's contribution to this part of the programme, a monologue, "Libertago en la Lito," was greatly appreciated and caused much amusement. It is evidently a translation or adaptation of Barie's "A Holiday in Bed," from the well-known "Princess Mary's Gift Book." In its interpretation M. Vandervelde showed himself an excellent actor in a humorous part such as this, and his clear enunciation and pleasant voice made every word carry. The hearty singing of the Esperantist Hymn, "La Espero," brought the first part of the programme to an end.

Before the commencement of the second part Mr. Bernard E. Long, M.A. (Harrow), author of *The Passing of Babel*, delivered an excellent short address on "Esperanto: Its Character, its Aims, and What it has Already Accomplished," in English, for the benefit of the visitors. The artistes already named then delighted the company with further vocal and instrumental items. M. Vandervelde recited two pathetic monologues, "Malgoja Tempo" and "Al Mia Patrujo." Dr. Pollen, after again heartily thanking the organisers of the Congress and the Mayor and Corporation for their kind hospitality, to which Mr. Walter Pitt responded, recited with fine oratorical effect a poem in honour of the Belgian nation, which he had translated from the Russian. At his request Mdme. Sužadinof recited the original poem in Russian.

Dr. Pollen having at this point to leave the meeting, it fell to Mr. Warden, of Edinburgh, to make the closing remarks. This he did in a few graceful words of thanks and reminiscence. Incidentally he mentioned that this was the 27th Esperanto Congress at which he had been present, a record, we imagine, hard to be beaten. M. Robert de Leener and D-ro Van der Biest also spoke on behalf of the Belgians present. The whole company then sang "Estintaj Tagoj" ("Auld Lang Syne"), followed by "God Save the King" and the Brabançonne.

Thus ended officially the Eighth British Esperanto Congress. Its success surprised us all, and it has been a very bright and encouraging interlude in a time of discouragement and gloom. To Mr. Walter Pitt and to Messrs. Blackett and Padfield, who so courageously decided to invite the Esperantists of two nations at this time, we all owe a deep debt of gratitude.

GREETINGS, GOOD WISHES, AND THANKS.

From the BISHOP OF BRISTOL.—"I send all good wishes for your Congress. Anything which at the moment can help to draw nations together is of the utmost value. I wish I could be present, but engagements prevent this, but by all means put my name as a patron."

From Prof. GILBERT MURRAY, Regius Professor of Greek in Oxford University.—"I send all good wishes to the Esperanto Congress. The situation of Europe after the War will, I think, increase fourfold the need for some common means of communication between the different peoples, and I think there are few more profitable ways in which a man can now spend his leisure than in thoroughly mastering Esperanto."

De S-ro GEO. J. COX, Vic-Prezidanto de B.E.A., Public Schools Brigade, Royal Fusiliers.—"Ĉiujn bondezirojn por la sukceso de viaj klopodoj en Bath.

"Neniam de la komenco de nia movado estis la laboro de veraj Esperantistoj pli grava aŭ necesa ol nuntempe. Kia terura katastrofo subpremas nin! Se ĉi tiu sensenca monstro de Kulturo estas la rezulto de civilizo, la barbarismo estus multe pli preferinda. Felice ĝi estas nur la senprudenta celo de malgranda grupo de homoj. Tamen ĝi minacas la tutan civilizacion, kaj ŝajnas al mi, ke la sola espero por la homaro kūsas en la starigo de la homa kaj prudenta sento, kiun la Esperantismo

esprimas. Por tio la plej rapida vojo kuſas en la disvastigo de la lingvo.

“Kia reĝa, rava revo vin alvokas al batal,
Por la vera homamanto kia sankta ideal!
Unu homa amikaro, unu familia rond’,
Unu lingvo, unu koro, unu celo tra la mond’.

“Denove—sukceson al viaj klopodoj!

“Bedaŭrinde, kiel soldato mia korpo devas resti
ĉi tie, sed mia spirito jam forflugis al vi.”

De S-ro HARRISON HILL, Vic-Prezidanto de B.E.A.—“Salutu, mi petas, niajn kunbatalantojn en mia nomo, kaj esprimu mian doloron, ke mi ne povas partopreni la 8an Britan Kongreson *horpe*, sed mi estas kun vi *tutanime*. Ni Esperantistoj havas la sanktan devon, kurage kaj lojale konservi la internan ideon de Esperantismo, dum ni lojale subtenas per nia tuta forto la aferon de nia Reĝo kaj lando—la lando de libereco. Ne estas facile, ĉar unu idealo ŝajne kontraŭbatalas la alian. Ni malamas la spiriton de tiraneco. Ni *devas* venki la tiranon, sed samtempe ni *ne* devas forgesi niajn karajn samideanojn en la “malamikaj landoj.” Ili ne volis militi. Ili nur deziris esti kun ni, pacaj batalantoj. Ni ja havas unu komunan heroon, *Zamenhof*. Ni ankoraŭ havas unu komunan idealon—la triumfo de la Esperantismo. Dum la milito, en la plej malfacilaj momentoj de kreskantaj teruroj, konservu ni en la koro la fajron de amo, la flamon de amikeco, la neniam ekstingebilan lampon de Esperantismo. Farante tion ni povas esperi, ke ni kaj niaj amikoj ĉiulandaj reprenos la manojn, kunmarĝante, en la lumo de libereco, al la gloro de tutmonda frateco. Vivu Esperanto!”

De Prof-o D-ro G. JAMESON JOHNSTON, Dublin.—“Mi treege bedaŭras, ke mi ne povas ĉeesti la nunjaran kongreson pro troa laborado. Ses membroj de la stabo de mia hospitalo militiris, mi estas la sola ĥirurgo restanta. Cetere mi devas zorgi pri la vunditoj en la Dublina Kastela Hospitalo. Bonvolu transdoni al la kongresanoj la korajn salutajn kaj bondezirojn de la Prezidanto kaj membroj de la Dublina Grupo kaj persone akceptu la samajn.”

De S-ro H. CLEGG, Sekretario de B.E.A.—“Por la unua fojo mi mankos ĉe Brita Esperantista Kongreso proksiman Pentekoston. Tio estas por mi tre bedaŭrinda afero, sed la nunaj cirkonstancoj estas neordinaraj kaj la aferoj de multaj homoj sangiĝis.

Kun granda plezuro, mi ricevis la sciigon ke pli ol 100 samideanoj aniĝis, kaj mi ne dubas, ke tiu rezultato kontentigas vin, ĉar tre certe antaŭ la malfermigo tiu nombro senteble pligrandiĝos.

Kvankam mi ne povos esti kun vi korpe mi nepre estos tie spirite, kaj en la ĝusta tempo mi havos antaŭ mia mensa vido la spektaklon de bonega kongreso. Al la afero mi deziras plenan sukceson kaj mi esperas ke la laboroj portos bonajn fruktojn, kaj ke la kongresanoj havos plezurigan restadon en la bela urbo Bath.

Necesas memori, ke post la milito Esperanto ricevos fortan puſon antaŭen, kaj ni ĉiuj devas estas pretaj uzi la okazon, tuj kiam ĝi aperas sur la horizonto.

Al vi persone miajn gratulojn kaj bondezirojn. Al Esperanto longan vivon kaj kreskantan sukceson. Al ĉiuj bonegan kongreson.”

Short telegrams of greeting were also received from—Our President in France, Lieut. H. BOLINGBROKE MUDIE.

La Lancashire and Cheshire Federacio, per S-ro APPLEBAUM, prezidanto.

La EMANUELA GRUPO, Camberwell.

From Major MURRAY, Equerry to H.R.H. DUKE OF CONNAUGHT.—“I am desired by the Duke of Connaught to ask you to convey to the 8th Congress of British Esperantists assembled at Bath His Royal Highness's thanks for their kind message.”

From SOCIETY OF FRIENDS Meeting, London.—“Friends' yearly meeting thanks Esperantist Congress for kindly greeting.”

Meeting of Ministry and Oversight.

De Leüt. H. BOLINGBROKE MUDIE al la ORGANIZA KOMITATO.

KARAJ AMIKOJ,—Mi deziras vin tre kore danki kaj gratuli pri la granda sukceso de viaj klopodoj.

Mi jam ricevis plej favorajn raportojn pri la Kongreso, kaj mi bedaŭras la cirkonstancojn, kiuj malpermesis al mi partopreni en ĝi.

Esperable la fino de tiu ĉi militado lasos la civilizitan mondon pli ol iam konvinkita pri la urĝa bezono por lingvo, kiu ebligas al tiuj, kiuj kune laboris kaj kune suferis, kune amikiĝadi.

Do en la nomo de ĉiuj Britaj Esperantistoj mi vin dankas por la grava servo, kiun vi faris al vere grava afero dum plej grava krizo.

Council Meeting, B.E.A.

Held in the Guildhall, Bath, on Monday, 24th May, after the Annual General Meeting. Present: Messrs. A. J. Adams, M. C. Butler, B. Chatterton, C. A. Fairman, F. A. Goodliffe, B. E. Long, Rhodes Marriott, A. Morrow, W. Phillimore, R. Robertson, J. M. Warden, Dr. John Pollen, Col. G. S. Robinson, Rev. J. C. Rust. In Attendance: Mr. E. A. Millidge, The Acting Secretary.

Chairman.—Dr. Pollen was elected Chairman of the meeting.

Minutes.—The Minutes of the previous meeting were read, approved, and signed.

Sub-Committees.—Mr. Warden objected to the recommendation of the last Council that certain Sub-Committees should be dissolved. After some discussion it was proposed by Mr. Robertson and seconded by Rev. J. C. Rust that all Sub-Committees be re-elected, and that the Council consider and define the duties of those Committees at the earliest opportunity.—Carried unanimously.

Councillors.—Mr. Warden asked that Provincial Councillors be notified of any proposal to change in any way the permanent working of the Association, and that Agenda Papers be sent to them in time for their consideration.

Mr. Butler urged that Esperanto should be made the official language to be used at Council Meetings of the Association. The suggestion was briefly discussed, but did not meet with the acceptance of the meeting.

The Joke of the Congress.

A Dignified Protest.

Bathonians as Bananos.—I here seize the opportunity which reference to Esperanto affords, and a sense of its injustice (in one respect, at least) prompts, to express a grievance against Esperanto. It transpired at the Conference, to the seeming great delight of the Esperantists, that the Esperanto word for Bathonian is *Banano*. This is a matter which the Bath Esperantists ought to insist upon amending. It is not meet that a citizen of this dignified city must go through life as a *Banano*, and whenever Esperanto becomes the universal language—if ever it do so develop—the position of the native of Bath will be most undignified and intolerable. To have to reply to the question, “What part of the country do you hail from?” with “Sir, I am a *Banano*,” is an appalling prospect. And, understanding that Bathonian and banana are both represented in Esperanto by *Banano*, I am the more impelled to protest that we should not be rendered liable to classification with the two or even three-a-penny all-ripe variety of *Banano*.—From *The Bath Chronicle*, May 29.

La Brita Esperantista Asocio.

Raporto pri la Ĉiujara Generala Kunveno de la Membroj okazinta en Guildhall, Bath, lunden, la 24an de Mayo, 1915, je la 9a horo matene.

Prezidis.—D-ro JOHN POLLON, C.I.E., LL.D.

D-ro Pollon oni aklame elektis Prezidanto de la Kunveno.

La PREZIDANTO leviĝis kaj unue parolis pri la manko de nia kara Prezidanto, Leüt. Mudie, kiu sendube estis kun la kongresanoj anime. Lia propono, ke oni sendu saluttegramojn al *H.R.H. Duke of Connaught, Lieut. Mudie*, kaj la *Congress of Friends* estis aklame akceptita. Sekvis dankesprimo al la Urbestro de Bath (S-ro F. W. Spear), al S-ro Walter Pitt, J.P., Prezidanto de la Grupo en Bath kaj al liaj sekretarioj, S-roj E. R. Blackett kaj W. W. Padfield, L.K., kaj gratulo al la Bath'anoj.

S-ro PITT esprimis sian plezuron vidi tiom da partoprenantoj kaj diris, ke, kvankam en la komenco li dubis, ĉu estas konsilinde organizi Kongreson, li nun estas kontenta pri ĝia sukceso kaj esperas ke baldaŭ okazos alia Esperantista Kongreso en Bath, sed dum pli trankvila tempo.

Telegramoj de la "Congress of Friends" en Londono, kaj de S-ro Witteryck el Hastings, Prezidanto de Belga Ligo Esp., kaj letero de S-ro Harald Clegg, Profesoro Gilbert Murray, la Episkopo de Bristol, Lance-Corpl. Geo. J. Cox kaj Fraŭlino E. A. Lawrence estis legitaj.

S-ro J. J. BOUTWOOD, J.P. (el Hastings), klarigis la foreston de S-ro Witteryck, kiu estas tre maltrankvila pri la sorto de sia edzino kiu, foririnte al Belgujo antaŭ kelkaj semajnoj nek revenis, nek skribis. D-ro Pollon promesis esprimi al S-ro Witteryck la amikajn sentojn de la kunvenintoj.

Oni elektis S-rojn W. Phillimore kaj A. Morrow ekzamenistoj de la balotlistoj.

La Prezidanto aludis la raporton de la Konsilantaro (pg. 59 de THE BRITISH ESPERANTIST, Marto, 1915) kaj citis kelkajn gravajn paragrafojn. Tiun raporton kaj la kontaron de la pasinta jaro la Membroj unuanime akceptis.

S-ro WM. BROWN esprimis sian opinion ke estus grava helpo al la Movado se oni povus elspezi pli da mono por reklamado.

Por la Naŭa Brita Kongreso neniu invito estis ricevita, kaj oni decidis lasi la aferon al la konsilantaro.

La Prezidanto aludis leteron de la firmo C. Comins & Co., per kiu ĝi proponis siajn servojn kiel honoraj kontrolistoj de la kontaro. S-ro G. Noble Farmer starigis kaj laudis la kompetentecon de tiu firmo, kun kies ĉefo li antaŭnelonge parolis. Oni aklame akceptis la proponon.

S-ro GOODLiffe (el Letchworth) proponis, ke la Kongreso sendu amikajn salutojn al samideanoj en aliaj landoj, eĉ malamikaj, kiuj malšatas militon kaj faras servojn al alilandaj Esperantistoj.

S-ro J. MERCHANT (el Sheffield) diris, ke la celo estas bona, sed kontraŭstaris, ĉar, laŭ sia opinio, estos preferinde tute ne rilati kun la malamiko en la nunaj cirkonstancoj, por eviti malutilon al nia movado.

La PREZIDANTO diris, ke ĉar la Esperantismo ekzistas inter la diversaj nacioj, la diritaj samideanoj bone scias, ke la Britaj Esperantistoj fidos je ili—kiel Esperantistoj. Do, ne estas necese ion sendi. Tion oni generale aprobis.

S-ro PHILLIMORE (el Londono) transdonis la raporton pri la balotlistoj al la Prezidanto, kiu anoncis la sekventojn elektojn:

Prezidanto.—Lieut. H. Bolingbroke Mudie, Hon. F.B.E.A.

Vic-Prezidantoj.—George J. Cox, Harrison Hill, Herbert F. Höveler, Prof. G. Jameson Johnston, F.R.C.S.I., F-ro E. A. Lawrence, Hon. F.B.E.A., John Pollon, C.I.E., LLD., Pastro J. C. Rust, M.A.,

F.B.E.A., Rt. Hon. Sir Thomas Vezey Strong, P.C., K.C.V.O., J. Mabon Warden, F.B.E.A.

Hon. Kasisto.—Bertram Chatterton, A.M.I.C.E.

Specialaj Konsilantoj.—A. J. Adams, Montagu C. Butler, L.R.A.M., F-ro Ad. Schäfer, Archibald Sharp, B.Sc., A.M.I.C.E.

Ordinaraj Konsilantoj.—E. R. Blackett, Paul Blaise, F-ro E. O'Brien, Rhodes Marriott, Andrew Wilson.

La anoncon oni ricevis kun aplaŭdado, kaj al la ekzamenintoj de la balotlistoj oni faris rezolucion de danko.

S-ro ROBERTSON esprimis bedaŭron, ke la nomo de S-ro CLARENCE BICKNELL ne troviĝis sur la listo de Vic-Prezidantoj. Oni proponis elekti lin Honora Vic-Prezidanto. Pastro Rust kontraŭstaris pro tio, ke la reguloj de la Asocio ne ebligas la elekton de honoraj Vic-Prezidantoj. Sekvis vigla diskutado, en kiu partoprenis ankaŭ S-roj BUTLER, RHODES MARRIOTT, PITT, kaj WARDEN. Fine, laŭ propono de S-ro H. R. H. COXE subtenita de S-ro MERCHANT, oni decidis esprimi dankon al S-ro Bicknell por lia sindona helpo al la Asocio kaj al nia movado.

S-ro BERTRAM CHATTERTON faris vigligan kaj impresan paroladon pri la stato de la Garantia Kaso kaj la financa stato de la Asocio. Li diris, ke estas necese ricevi garantiojn ĝis la sumo de £820 por atingi la minimumon (£5,000). Li plue proponis rimedon por forigi tiun mankon per kotizoj. Ĉiuokaze, li diris, por konservi nian pozicion en la Esperantista mondo, daŭrigi nian propagandon kaj resti en nia "luksa" sed necesa ĉambraro en Londono estos nia devo iamaniere forigi la jarajn deficiton.

S-ro WARDEN faris alvokon, petante, ke la ĉeestantoj aŭ garantiu la necesan sumon de £820 aŭ kotizu 10% de tiu sumo.

Tuj leviĝis S-ro J. J. Boutwood kaj garantiis £100, D-ro Pollon pluajn £100, S-ro Richard Sharpe pluajn £50, S-ro Pitt £40. La "fajro," ekbruligita de S-ro Boutwood, rapide disvastiĝis tra la tuta ĉambrego. La nomojn oni ne povis sufiĉe rapide skribi. Kiel ĉe aŭkcio, tri anoj el, por la momento "malamikaj" provincoj konkiris por atingi plej altan sumon. Ĉiu kontentiĝis atinginte £60.

Post kelkaj minutoj la KASISTO anoncis, ke en tiu kunveno pli ol £1,000 estas jam garantiitaj kaj kore dankis al tiuj, kiu ebligis al la Asocio daŭrigi ĝian laboron kiel kutime dum ankoraŭ unu jaro.*

D-ro W. VAN DER BIEST (el Antverpeno), en la nomo de la Belgaj Kongresanoj, dankis la Britajn samideanojn por ilia simpatio kaj por la mona helpo donita, kiu ebligis al ili kunveni en Bath. D-ro Pollon konsentis, nome de la Britaj donacintoj, kontroli la elspezojn.

Laŭ propono de Kol-o ROBINSON (el Eastbourne) oni decidis sendi telegramon al Leüt. Mudie, esprimantan la simpation de la kongresanoj.

S-ro SUJADINOF, rusa membro, parolis pri la devo de la Esperantistoj post la Milito. Si komparis la nunan situacion de Eŭropo kun tiu de la Izraelidoj dum ilia suferado kaj vojaĝado tra la dezerto. La dezerto estas la Milito, si diris. Por ŝangi la venantan generacion estos necese instrui al la infanoj en la lernejoj la vojon al Frateco per la lernado de nia Internacia Lingvo. Tiu generacio kreskos kaj iros supren sur la montoj, jetante bombojn de bono ĉiuspeca. Nia devo estas konvinki la instruestrojn pri la graveco de nia Movado.

Post la kutimaj dankesprimoj al la Prezidanto, organizintoj, k.t.p., la kunveno fermigis je la 12a horo.

KUNVENO DE LA GARANTIULOJ.

Tuj post la Ĝenerala Kunveno D-ro Pollen alparolis la Garantiulojn kaj, en la nomo de la Asocio, esprimis koran dankon por ilia subteno kaj helpo.

* Plena listo aperas sur pg. 139.

Raporto pri la Sepa Belga Esperantista Kongreso.

(Bath, Mayo 22—25, 1915).

La Sepa Belga brile sukcesis. Tiun sukceson ni ŝuldas al la helpemo, al la frateco de niaj britaj samideanoj kaj speciale de la Bath'aj Esperantistoj. Mi do komencas la jenan raporton, dirante kaj redirante mian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj ebligis la Belgan Kongreson.

Tre kore la lokaj Esperantistoj akceptis nian areton, kaj ĉiuj belgaj kongresintoj havas nun kelkajn bonajn, porvivajn amikojn en la ĉarma Angluja banurbo.

La Sepa Belga okazis samtempe kiel la Oka Brita. La Britan ĉeestis pli ol ducent kongresanoj, la Belgan dekkvar. Certe, kompare kun la antaŭaj belgaj kongresoj ĉi tiu nombro estas malgrandega, sed la kunesto de tiom da ekzilitoj, en amika sed fremda lando, ŝajnis al mi mirinde grandnombra.

Sabaton, la 22an, oni vizitis kaj revizitis la tre bone aranĝitan Akceptejon, en la Urbdomo, kie la sindonaj sekretarioj de la Loka Komitato, S-ro Blackett kaj Padfield (neforgesotaj nomoj!), tre ageme helpadis ĉiujn. Vespere la urbestro kaj lia edzino*, Ges-roj Spear, akceptis la anojn de ambaŭ kongresoj en la Banpalaco: brila akcepto kun aproba parolo de Lia Mosto, kun kelkaj klarigaj vortoj de S-ro Pitt, Prezidanto de la Loka Komitato, kaj de D-ro Pollen (la amata viceprezidanto de B.E.A., kiu estas la tipo de la ĉiam bonhumora, ĉiam helpema, ĉiam propagandema Brita Esperantisto, prezidis la Britan Kongreson); antaŭ kaj post la paroladoj okazis koncerto, dum kiu distingiĝis, interalie, niaj geamikoj, F-ino Vermeulen kaj S-ro Vandervelde. Dum intervalo oni vizitis la Romajn Banejojn, nepre interesajn.

Dimanĉon matene, post diservo estrata de la afabla kaj simpatia Pastro Rust, okazis nia Belga Kunsido.

Mi malfermis la kunsidon, sciigante la kongresanojn, ke S-ro Witteryck, prezidanto de la *Belga Ligo Esperantista*, kiu aliĝis al la kongreso, estas pro malfeliĉaj familiaj cirkonstancoj neeligitita veturi al Bath. Mi legis leteron de nia kara Prezidanto, kiu deziris sukceson al la kongreso kaj deziris, ke mi anstataŭ lin.

Aliaj bondeziroj venis de F-ino Posenaer, de S-ro Harrison Hill, de S-ro Agurtin, de S-ro Bormans, kaj de la *Cheshire kaj Lancashire Federacio*.

En malferma parolo mi esprimis mian emocion prezidente Belgan Kongreson en fremdlando, mian konfidon en la estonteco de l' patrujo kaj de Esperanto, kaj mian dankon al la Britaj samideanoj, kiuj prenis sur sin ĉiujn elspezojn de tiuj el la belgaj kongresanoj, kiuj tion deziris aŭ akceptis. Mi insistis sur la ŝuldo, kiun ĉiuj Belgoj havas al la Brita Nacio kaj al ĝia Reĝo (aklamo).

Mi ankaŭ klarigis, ke nia kunsido tute ne pretendas esti la oficiala ĉuijara ĝeneralaj kunsido de l' Belga Ligo, kaj do ne rajtas alpreni decidojn, nur esprimi dezirojn.

Mi resumis la fiancan staton de la Kongresa kaso; la enspezoj estis la jenaj:—

	£	s	p
Pere de B.E.A.	9	18	0
De F-ino Miller (Wisbech)	0	15	0
De S-ro Pearson (Sheffield)	1	1	0
De S-ro X (Edinburgh)	1	0	0
De S-ro Van Weyenbergh (Brugge)	0	10	0
De S-ro Brown (Chorley)	0	10	0
De S-ro Whitaker (Bath)	1	1	0
<hr/>			
	£	14	15
	0		

F-ino Peckover (Wisbech) pagis senpere la elspezojn de tri kongresanoj.

* [Lia respektata Edzino bedaŭrinde forestis pro mal-saneto, kaj lia Filino, S-ino Paul Chesterman, anstataŭis ŝin.—RED., B.E.].

La elspezoj estis £13 3s.; restis £1 12s., kiujn mi transdonis al S-ro Blackett, sekretario de la Loka Komitato, por malgrandparte repagi la elspezojn kiujn la Bath'aj samideanoj faris por ni.

Mi proponis, ke du kuratoroj, unu brita kaj unu belga, ekzamenu la kontojn de la kongreso; tiu propono estis akceptata. (La kuratoroj—S-roj D-ro Pollen kaj Pastro Minten—tute aprobis tiujn kontojn).

Iu demandis, ĉu la kongresanoj deziras esprimi dezirojn rilate al la milito aŭ la eventuala paco. Unuanime la kongresanoj, post parolo de S-ro van Dieren, decidis neniel interveni en tia direkto.

Mi faris alvokon por ke, post reveno en Belgujo, ĉiuj kongresanoj estu kaj restu anoj de grupoj, kaj abonu la revuon *Belga Esperantisto*, kies daŭrigado estas jam nun certa, kaj aklamigis la nomojn de S-roj Witteryck, prezidanto de la *Belga Ligo*, kaj Van Schoor, direktoro de *Belga Esperantisto*.

La ĉeestantoj sciigas pri propagando farata en Holando de S-ro Champy, kiu faris poresperantajn paroladojn tie, kaj de F-ino Posenaer, kiu organizis kurson kaj verkis gazetartikolojn. F-ino Posenaer ankaŭ kiu komenciĝanta sukceso klopojis, por ke la Belga Ŝtato faru pornacian propagandon pere de Esperanto, same kiel faris niaj malamikoj kaj la Franca Respubliko. S-ro Vandervelde sciigis la kongresanojn, ke S-ro Blaise intervenis samsence apud S-ro Ŝtatministro Hymans.

Aŭdante, ke S-ro D-ro Gaster faris kaj daŭrigas fari kontraŭbelgan propagandon, la ĉeestantoj unuanime esprimas la deziron, ke la *Belga Ligo* forstreku lian nomen el la listo de siaj honoraj membroj.

Antaŭ ol disiĝi, la ĉeestantoj aklamas la nomojn de Reĝo Alberto kaj de D-ro Zamenhof, kaj S-ro Advokato van Dieren tro afable dankis min pro miaj—tute rekompencitaj—penoj.

Posttagmeze, la Belgoj kaj la Britaj vizitis la parkojn de la ĉarma banurbo, gvidataj de afablaj "bananoj."

Vespere oni improvizis koncerton, dum kiu F-ino Vermeulen kaj S-ro Vandervelde denove ĉerpis laŭrojn, kaj dum kiu S-ro de Leener, S-ro Kaplan kaj mi esprimis la sentojn de la Belgoj al Britujo.

London matene dum la ĝeneralaj kunsidoj de B.E.A. mi diris ree mian dankon kaj la deziron, ke tiu dankesprimo estu enskribita en la oficiala protokolo.

Posttagmeze kaj la sekvantan tagon oni are vizitis la belegajn ĉirkauaĵojn de Bath, kaj oni fine disiĝis, dezirante al niaj Britaj fratoj feliĉan revidon en la por ĉiam liberigita Belgujo.

D-RO W. VAN DER BIEST.



Alvoko kaj Danko.

En la belga armeo S-ro Jos. Cnudde, Genta Esperantisto, multe klopojas por Esperanto. Jam ekzistas malgranda klubo "Soldato Stelo," sed la klubo estas malriĉa. Kompreneble! La tutu belga lando estas okupata.

La personoj kiuj volus helpi la movadon sin direktu al S-ro JOSEF CNUDDE, *brancardier 8 lign. 1/I, Belgian Army*.

Ili povas sendi malnovajn Esperantajojn, k.t.p.

S-ro Jos. Cnudde deziras ankaŭ korespondi kun anglaj samideanoj.

S-ro H. Bonabo en Harderwijk, Holando, belga suboficiro, dankante pro la al li senditaj propagandiloj, skribas "Mi estas ĉiam kontenta pri la sukceso de mia propagando inter la soldatoj. La unua kurso estas finita, kaj la lernantoj jam korespondas multe kun eksterlandanoj. La dua kurso bone marĝas, kaj mi esperas malfermi novan por novaj lernantoj la unuan de Julio. Do malgraŭ la milito la Esperanta movado ne dormas, sed ĉiam antaŭeniras."

CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address: 17, Hart-street, London, W.C.

COMING EVENTS.

Propaganda Kunveno okazos en Finsbury Park, Norda Londono, Dimancon, Julio 4an, 11-1.

Esperanta Diservo okazos en *Harcourt Church, St. Paul's-road, Canonbury, N.*, je 3.15, Dimancon, Julio 11an, kiam parolos Lt.-Kol. Pollen, C.I.E., kaj kantos S-ino Jessy Kent-Parsons, de la R.A.M.

Croydon.—Ci tiu grupo kore invitas la Esperantistaron de Londono kaj ĉirkaŭaĵo partopreni ĝian ĉiujaron Vagekskurson, Sabaton, la 10an de Julio.

Rendevuo.—Stacidomo, West Croydon, je la 3a p.t.m. ĉe eliro de la "Down Platform." Tiuj, kiuj alvenos stacidomon, East Croydon, povos atingi la rendevuon en dek minutoj per George-street kaj Wellesley-road.

Programo.—Ekiri de la West Croydon Stacidomo tuj post la 3a, tra la bela Wandle Park kaj Waddon, laŭlonge de la riverbordo kaj preter la malnovaj mueliloj ĝis Beddington kaj Carshalton.

Temango en la Hotelo Greyhound, 5 p.t.m. Reveno tra Beddington kaj Waddon ĝis West Croydon.

Kosto de la Te-Bileto, 1s. Se aĉetita post la 5a de Julio, 1s. 3p.

Sekretario, L. L. S. LOUIS, *Courtney House, Courtney-road, Waddon.*

La Croydon Societo kunvenas ĉiumarde en Ruskin House, West Croydon, 8 p.t.m.

Federacio Esperantista de Jorkširo.—La Duonjara Konferenco okazos en Roundhay Park, Leeds, je la 17a de Julio, 1915.

Estas proponite, ke la vizitantoj kolektigu ĉe la statuo de la Nigra Princo, sur "City Square." De tiu loko karavanoj ekiros tramveturile al la Parko je la 2a, la 3a kaj la 4a, sub la gvidado de lokaj samideanoj, kiuj kondukos la gastojn al la Ĝardenoj, Arbaroj, Lagoj, Labirinto, k.t.p. (Bona boatado estas havebla sur la "Waterloo" Lago.) Ĉiuj kunvenos en la "Mansion" por *Temango* (po 1s.) je la 5a.

Poste.—Komitat-Kunveno kaj Konferenco, kaj se la tempo permesos, laŭvola programo da ludoj, kantoj, k.t.p. (Ciu alportu la "Tekstaron" aŭ "Huddersfield Kantlibron.")

Oni esperas aranĝi subĉielan *Propagandan Kunvenon* dum la post-tagmezo. Kiu bonvolas helpi pri tiu ĉi, ĉu parolo, ĉu kante, afable skribu al la sek., F-ino C. M. E. Morton.

Estas insiste petegate, ke la grupsekretarioj almenaŭ du tagojn antaŭe, sciigu la proksimuman nombron da ĉeestantoj al F-ino L. Briggs, *West Lea, Armley, Leeds.*

Pri ĉiuj aliaj detaloj oni sin turni al la sekretariino, F-ino C. M. E. Morton, 49, *Mount Pleasant-street, Dalton, Huddersfield.*

Summer School of Esperanto—Edinburgh, August 2-7.—Although the minimum number of enrolments requisite to carry through the School on the scale contemplated in the circular issued by the Edinburgh Esperanto Society has not been reached, it has been arranged, in response to earnest requests, to hold the School, though on somewhat less ambitious lines. The classes will be held in the Esperanto room in the Synod Hall, and instruction will be given by Mr. M. C. Butler and Mr. J. M. Warden. There will be a full programme of excursions and abundant opportunity for conversation practice. Further particulars will be found in the *Esperanto Monthly* for July. Those intending to be present should write at once, with the fee 10s. 6d., to Mr. W. M. PAGE, 127, *Bruntsfield-place, Edinburgh*, Hon. Organiser.

GENERAL.

Journalists and Esperanto.—Bath journalists who have this week had the duty of reporting the British Esperanto Association's Congress will, perhaps, bear me out that knowledge of that language may sometimes be useful. It may be remarked in passing that Esperanto was introduced to England and her people by a Yorkshire (Keighley) journalist, Mr. Joseph Rhodes, who is at present President of the Yorkshire Esperanto Association, and was a delegate to the Congress. Mr. Rhodes has travelled extensively in Europe, having visited every country, as well as having paid a visit to Palestine. In all his tours he has depended largely upon Esperanto to guide his footsteps in the right direction.—K.Y.

[The editor of *The Newspaper World* has thoroughly investigated Esperanto, and believes it to be an admirable auxiliary language. In his humble judgment, one of the finest outcomes of the present war would be the compulsory study of Esperanto as a secondary language in every school throughout Europe. A common European secondary language would prevent a thousand international misunderstandings.—Ed., N.W.]

From *The Newspaper World*, May 29.

Commercial Travellers and Esperanto.—At the Conference of the United Kingdom Commercial Travellers' Association recently held in Manchester the late President, Sir Richard Cooper, Bart., M.P., in his retiring letter to the Association, called the attention of the members to the value of acquiring an additional language. This gave Mr. Vincent Grimmett, our *Samideano*, and one of the Delegates, an opportunity of speaking on behalf of the *Kara Lingvo*. He was listened to with interest, with the result that after the first meeting twelve members asked for and have since received the necessary particulars.

L.C.C. Classes in Esperanto Shorthand.—Last year an experimental class in Esperanto Shorthand was held at the Queen's Road Institute, Dalston Lane, N.E., and proved so successful that the teacher, Mr. M. C. Butler, at the request of the Education Committee, has agreed to repeat it throughout the coming summer. The class, therefore, commenced on 26th May, and meets every Wednesday evening from 7.15 to 9.45. The success of the class is an indication of the increasing commercial importance of Esperanto. Mr. Butler's own adaptation of Pitman's Shorthand to Esperanto is taught, and Esperantists who wish to acquire the very useful art of reporting in the popular universal language would be welcomed as members of the class.—From *Pitman's Journal*, June 5.

LONDON.

Londono.—Tre sukcesa ekskursa okazis Sabaton, 12an de Junio, al Kew Gardens, kaj oni devas multe gratuli S-rojn J. Almond kaj Paul Blaise pro iliaj penadoj, al kiuj la ekskursa ŝuldas sian bonan efektivigon. La samideanoj renkontiĝis en la ĝardenoj je la tria p.t.m. kaj vagadis tra tre belaj lokoj; la gusto de nia afabla gvidinto, S-ro G. Gibbons, estas admirinda en ĉi tiu rilato. Post kiam sentiĝis al ni la belaĵoj de la naturo kelkaj deziretoj pri tiuj esence homaj aferoj, t.e. la mangajo kaj la trinko, kaj jen, irinte en la restaŭracion de Pitt, ni trovis ke estis eble al ni plenplene satigi je tre modera kosto. Trovinte ke la nombro da ĉeestantoj estas iom pli granda ol la restaŭraciesto atendis, la

skribinto metis sian "sultron al la rado," aŭ pli vere siajn manojn al la tepotoj kun plena energio: sed li nun devas esprimi sian profundan bedaŭron pri siaj du-tri malfeliĉaj maltrafoj, kiam trovis tiu teo ian neantaŭviditan vojon sur la vestajojn de kelkaj amikoj: li tre humile kaj sincere petas pardonon al tiu fraŭlino, sur kies belan vestajon li havis la nepriskribebalan malgojon surverŝi la enhavon de lakto-kruĉo. Post kiam ia ĉeestantaro bone regalis sin, okazis, sub prezido de S-ro R. Robertson, neformala koncerto ĉe kiu partoprenis per kantoj F.-ino Morrison, S.-ino Winkler; deklamis kaj rakontadis F.-ino L. S. Grant, S.-roj B. Long, P. J. Cameron, W. H. Browne, C. Fairman kaj aliaj. S-ro E. Relf solo-ludis ĉe fortepiano kaj ĉe la lasta ankaŭ nia bone konata amiko, S-ro M. C. Butler, akompanis la kantadon. Dum la vespero oni hore entreprenis iom da "belega harmoni".

Kiam la koncerto finiĝis oni diskutis propagandon en Londono, S-ro Butler parolis pri sia propagando en Finsbury Park kaj faris alvokon por helpi al tio, kelkaj aliaj parolis kaj poste estis decidite okazigi kunvenon en Finsbury Park la unuan dimanĉon en Julio je la dekuna matene; oni estas tre petataj subteni.—W. H. BROWNE.

Buckhurst Hill.—La 7an de Junio okazis ekskurso al Epping Forest kiun partoprenis nur 17 homoj. Tiuj, kiuj ne povis veni, mi kompatis! Vere agrablan libertempon ni pasigis. Sajnis al la vizitantoj, ke S-ro Howard, la lerta gvidisto, konas la abaron kiel sian propran ĝardenon. Dufoje ni promenadis inter la densaj arboj, kien la varmega suno ne povis enpenetri kaj nur kuloj genis nin.

Post la temanĝo, kiu estis vera festeneto, bele aranĝita en Oak Hill Farm apud Theyden Bois, la ekskursanoj kantis "La Espero" por la profito de aliaj vizitantoj, al kiuj S-ro Vandervelde, Belga partopreninto, poste donis propagandilojn.

Al la sekretariino organizinto gratulon kaj dankon.
—Vizitinto.

Open-Air Lessons in Esperanto in Finsbury Park.—
NOVEL METHOD OF PROPAGANDA.—Under the auspices of the Tufnell, Mildmay, and Wood Green Groups open-air lessons in Esperanto will be given in Finsbury Park during the summer.

The meetings are held on Sunday mornings at 11 o'clock.

It is hoped that every Esperantist will try and make these meetings successful.

As it is not possible to hold these meetings every Sunday morning those willing to help should send a card to S-ro C. H. Edmonds, 73, Sydney-road, Hornsey, N., who will then send notices of the meetings.

Remember that you won't be forced to speak if you come.

More work can be done by speaking to individuals in the crowd than by the speaker on the platform.

Enlist in this work to-day!

Al Propagandistoj.

Granda pakajo da BRITISH ESPERANTIST aŭ *Esperanto Monthly* (malnovaj ekzempleroj) kontraŭ 9 pencoj por la sendkosto.

Diru, kiun vi preferas.

Edzigo.

En Sale Unitaria Preĝejo, Manchester, S-ro P. J. Cameron, sekretario de la Londona Klubo, kun F.-ino Elsie White, Ashton-on-Mersey, Manchester.

THE PROVINCES.

Bath.—As a result of the Esperanto Congress held here at Whitsuntide, a course of ten lessons in Esperanto has been commenced at the Technical School, Guildhall, on Friday evenings, from 7.30—9.30. Mr. W. W. Padfield is the teacher.

Cambridge.—On June 4 Dr. J. Pollen lectured before the University Esperanto Society at the Medical School, Downing-street. Dr. Pollen claimed that Esperantists throughout the world had done more than any other international body of its size to extinguish the German-made conflagration. It was not, he said, by burning the *Daily Mail* that the fire would be put out, but by helping "to pass the bucket from the well." Not only were Esperantists fighting at the Front, but Esperantists were making the truth about the war known in Germany.

Hastings.—During the winter months a class in Esperanto has been held for a fair number of Belgian refugees at the Club, at which the President of the Belgian League, M. Witteryck, has assisted, and addressed the pupils.

At the recent Exhibition and Sale of Work for the Blind held in the Masonic Hall, St. Leonards, Mr. A. J. Adams was in charge of some interesting apparatus for imparting knowledge to the Blind. He naturally, as one of our most experienced propagandists, took the opportunity of showing the advantage of Esperanto to the Blind. Whereas to reproduce books, etc., in Braille would be long and laborious work, if Esperanto were utilised (as it already is very considerably) the publications would be international.

Southport.—London, 17an de Majo, okazis la ĉiu-jara kunveno en nia grupkunvenejo, 561, Lord-street. Prezidis Pastro Ashby, kiu prezentis sian raporton pri la laboro de la pasinta jaro. La sekretariino, S.-ino Pierpoint, ankaŭ raportis pri la kunvenoj, k.t.p.

Dum la vintro okazis kurso en la Tehnika Lernejo; la instruistino, F.-ino Iddon, F.B.E.A., tre fervore laboradis, kaj multaj el ŝiaj lernantoj bonege sukcesis en la ekzameno.

Ankaŭ dum la pasintaj monatoj estis en la urbo multaj soldatoj, kaj la grupanoj aranĝis kursojn, k.t.p. Ĉirkaŭ 30 el ili ricevis la gramatikan libron. S-ro Tidswell afable aranĝis, ke ili havu apartan ĉambron, kie ili povis studi kaj interparoli. Kelkaj niaj anoj helpis la lernantojn, kaj antaŭ ol ili forlasis Southporton multaj povis paroli la lingvon. Ni kore esperas, ke ili uzos Esperanton kaj propagandos ĝin inter aliaj militistoj.

Pro la bonega aranĝo de S-ro G. W. Iddon, okazis parolado de S-ro Paul Blaise pri "Belgujo kaj la Belgoj"; estis monoprofito de £7 7s.

La grupanoj ankaŭ monkolektis por la "Ambulanco" kaj povis sendi al Londono la sumon de £9 3s.

Dum la somero okazis en nia urbo, la kunveno de la Lankasira kaj Ĉeſira Federacio, kiam la Urbestro afable akceptis la anojn ĉe Chapel-street. Poste estis propaganda kunveno en la Botanikaj Ĝardenoj.

S-ro Robert Wright prezentis sian raporton kiel kasisto, kaj ĉio estis kontentiga. Same estis la raporto de la libristo, S-ro Tidswell.

Oni tiam elektis la oficistojn por la venonta jaro:—
Prezidanto, Pastro Ashby; *Vicprezidantinoj*, S.-ino Wormald kaj F.-ino Iddon, F.B.E.A.; *Sekretariino*, S.-ino Pierpoint; *Kasisto*, S-ro R. Wright; *Korespondantino*, F.-ino Freda Smith, F.B.E.A.; *Libristo*, S-ro H. Tidswell; *Komitato*, S.-ino Hawksworth, S-ro G. W. Iddon, S.-ro Illingworth, S.-ro Balshaw, F.B.E.A., S.-ro Howard (el la Burnley'a Grupo).—F. SMITH.

York.—On June 1 Mr. W. F. Lawrence, secretary of the local society, addressed the York Girl Guides at the Y.W.C.A. on "International Language." There was a large and interested audience, and it is expected that a class for the study of Esperanto will shortly be formed in connection with the Y.W.C.A.

Among the newspapers which gave long reports of the Bath Congress are the following:—*The Bath Herald* (daily and weekly), *Bath and Wilts Chronicle* (daily and weekly), *Bristol Evening News*, *Western Daily Press*, *North Wilts Guardian*, *The Somerset County Gazette*, *Yorkshire Post*.

SCOTLAND.

Edinburgh.—Ci tiun someron S-ro Caw, estro de la Vagada Klubo, aranĝis tre bonan programon de marŝadoj. Unu el la plej allogaj ekskurstoj okazis la 15an de Majo, kiam la vagemuloj esploris la geologiajn karakterizojn de nia mondfama monteto, Arthur's Seat. S-ro Aitken, kiu posedas profundan scion de la geologia scienco, estis la kondukanto, kaj en flua Esperanto li klarigis la plej interesajn faktojn pri la historio de la monteto.

THE FEDERATIONS.

Yorkshire.—Je la 7a de Junio, 1915, okazis la Komitat-Kunveno de la Jorkšira Federacio, ĉe la Vicarage, Allerton Bywater, Castleford.

Laŭ la bonkorega invito de Pastro Curry, M.A., kaj la edzino, la afero fariĝis treege ĝuebla Garden-Festo je la belega Vicarage Gardeno. Antaŭ la temanĝo oni pasigis la tempon per ludoj—kroketo, pilkjetado, k.t.p. Post la temanĝo subĉielo okazis Esperanta Diservo je la apuda preĝejo de Allerton Bywater. Poste F-ino Fielding sperte, sprite kaj detale rakontis siajn aventurojn ĉe la Brita Kongreso en Bath je la Pentekosta Festo, 1915.

La Federacionoj uzis la okazon por esprimi al F-ino Tordoff, kiu post ne longe forlasos Anglujon por Usono por edziniĝi, bondezirojn por la estonteco, k.t.p. La ĉeestantoj kantis "Auld Lang Syne" esperante, kaj poste F-ino Tordoff taŭge respondis.

Fine S-ro J. Rhodes, la Federacia Prezidanto, proponis la koregajn dankojn de la Federacio al la Ges-roj Curry, kiu, tiel fervore kaj korege bonvenigis kaj amuzis la Federacionojn. Pastro Curry taŭge respondis.

GREATER BRITAIN.

We (Western Australian Society) are still keeping our heads above water, and instead of letting the subject drop, on account of the bad state of affairs generally, we are making bigger efforts to push forward the movement. We have continued the monthly meeting of the society, but for some time we have been in doubt as to how best to keep our young Esperanto students interested in the work, and last month we established what is now known as the "Western Australian Esperanto Society (Junior Section)." All students are entitled to membership in this section, and monthly meetings are held, as is the case with the ordinary society. As soon as a student in the Junior Section passes the necessary standard, he or she becomes eligible for membership in the Senior Society. This Junior Section is conducted entirely by the junior members, with, of course, the supervision of the president and the instructor of the advanced society. During 1914 we met quite a number of Esperantists who were travelling through on the mail boats, both to and from England, and did all possible to make their stay in port an interesting one. At our meetings we work to a time table, and in addition to the usual routine work, we generally find time to have some music.—VINCENT J. MATTHEWS, Secretary.

Durban, S. Afriko.—Estas mia bedaŭro anonci, ke la 1an de Majo forlasis Durban'on nia Prezidanto, S-ro Wettergreen. Tiu nun logas en Zululand'o (Empan geni), kie li nun penadas antaŭenigi nian movadon. Tiu ĉi loko ne estas urbo, sed vilaĝeto. Nia grupo ne kunvenis dum tri semajnoj pro la libertagoj, 24an kaj 31an de Majo.

Mi aŭdas tre kontentigan novajon el S-ro Mawbey en Johannesburg'o; tiu ĵus malfermis kurson, kiun ĉeestas 11 knaboj (skoltoj) kaj 3 plenaĝuloj, kaj ankoraŭ aliaj deziras aniĝi.—L. WOOD.

Simla, Hindujo.—Laŭ via bonvola permeso mi sendas al vi tiun ĉi unuan dumonatan raporton pri la agoj de nia neoficiala grupeto. Nu, ni lernadas, ni progresas kaj ju pli ni lernas, des pli tiu ĉi bela lingvo ĉarmas nin. Ni malofte preterlasas vesperon sen interesa leciono el la tre taŭga *Kursa Lernolibro* de Privat. Sekve, nia vortareto ĉiutage pilargiĝas. Mia sperto estas, ke la infanoj ne volonte studas aliajn naciajn lingvojn, sed mi trovis je surprizo, ke miaj du filinetoj tre ŝatas Esperanton. Ni havas ekzamenon monate, kiam la meznombro de poentoj ricevitaj de la dekunu-jara knabino estas 95 el 100, kaj la okjara neniam malpli ol 75. Mi pensas, ke ĉi tio estas bonega, se ne mirinda. Tia rezultato parolas multon pri la facileco de la Dua Lingvo.

Pri varbado, ni faras kion ni povas, kaj jam kelkaj urbanoj akceptis libretojn aŭ skribojn aŭ promesis skribi al la Asocio pri la afero. En tiu ĉi rilato, mi dividis la plimulton de miaj konatoj en tri kategoriojn: (a) tiuj, kiuj aŭskultas sed ne aŭdas; (b) tiuj, kiuj aŭdas sed ne memoras; kaj (c) tiuj, kiuj memoras sed laciĝas. Tamen, ni ne malesperas, kaj sendube ni kaptos aliajn rekrutojn de tempo al tempo. Per persisteco la Esperanta borilo povas trabari tra la plej malmola ajo!—H.C.P.



British Esperantists serving in the Army, Navy, or Red Cross.

FOURTH LIST.

ASHBERRY, Miss G., Sheffield Group, Red Cross, V.A.D.
EPSTEIN, H. A., U.E.A. Consul for London, Lance-Corporal, M.T. Section of A.S.C., G & H Block, M.T. Depôt, Grove Park, Lee, S.E.
FURNISS, J. W., Private, 10th Sherwoods.
GILL, J. A., Tunbridge Wells Group, Friends' Red Cross Unit, France.
HARRIS, Miss E., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
HIGHAM, W. H. M., Birmingham Group, Private, 6th Royal Warwicks, B.E.F., France.
KENYON, Miss, Southport Group, Red Cross, V.A.D.
LANCHESTER, Miss C., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
MURRAY, Miss G., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
PROBERT, GEO., Birmingham Group, Corporal, R.A.M.C.
SCHLEICH, C. S., East London Group, Private, City of London Rifles.
SHANKS, C. W., Lance-Corporal, 10th Herts Regiment.
TAYLOR, Miss E., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
THOMSON, Miss E., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
THOMSON, Miss M., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
THORP, FREDERICK, M.A., Southport Group, Private, 3rd City Battalion (Comrades) King's (Liverpool Regiment).
TIMMES, Miss F., Bexhill Group, Red Cross, V.A.D.
WALLER, Mrs. M., Sheffield Group, Commandant, Red Cross, V.A.D.
WATTS, FRED., Southport Group, Private, 10th Liverpool Scottish, now invalided home for the second time.
WEIR, Sheffield Group, Private, R.A.M.C.
WHIPPLE, D., Sheffield Group, Private, 12th York and Lancs. Regt.

Libraro kaj Gazetaro.

Civitanoj de l' Mondo, de YERVANT H. ISKENDER, fondinto; ĉefoficejo, *Tom-na-Monachan, Pitlochry, Skotlando*. 32-paĝa, bele presita, grandformata broŝuro. Tiu ĉi estas bonega traduko, farita de nia amiko, W. M. Page, el Edinburgo, de la konata verko, "Citizens of the World." Kiel anoncita sur la kovrilo de nia gazeto, ekzemplero de la broŝuro estas havebla senpage kaj afrankite al ĉiu leganto, kiu ĝin petos laŭ adreso supre citita. Ĉiu do, al kiu la paca progreso de la homoj estas interesa, petu tuj ekzempleron.

Kiel Sukcesigi la Vivon, de Jules Fiaux, tradukita de "Solom." 80-paĝa libro, eldonita de The Power Book Co., 58-9, *Bank Chambers, 329, High Holborn, London, W.C.* Prezo, 18. 2p., 1/3 afankite ĉe B.E.A. "Leginte la titolon de tiu ĉi libro, vi eble demandos al vi "Cu oni povas lerni kiel sukcesigi la vivon?" "Cu oni povas instruigi por direkti sian destinon laŭ sia propra deziro?"

Al tiuj ĉi demandoj mi respondas, "Jes." La konfeso, ke ni ne povas direkti nian destinon submetas nin sub la lego de l' fatalismo, kaj en granda mezuro deprenas de ni la homan dignon. Fakte, neniu homo normala estas absoluta fatalisto; ĉar ĉiu ago, kiun ni faras por nutri kaj vesti nian korpon, kontraŭstaras la fatalismon. Do, se ni estas liberaj, kaj posedas la povon por prizorgi pri niaj korpoj, ni ankaŭ havas la povon por maturigi nian spiritan naturon tiamaniere, ke ĝi faros la vivon agrabla al ni mem kaj al aliaj personoj; aŭ alivorte, ni povas lerni kiel sukcesigi la vivon. La plej bona kaj interesa studio, kiun oni povas entrepreni estas la kulturado de la mensaj kaj moralaj povoj."

Jen kelkaj vortoj el la antaŭparolo de ĉi tiu interesa libro, kiuj iom montras ĝian temon kaj celon. La dudek-unu ĉapitroj estas tre legindaj kaj la traduko bone farita. Ni rimarkas, tamen, kelkajn eraretojn, ekz., "sed siaj gepatroj kaj antaŭuloj," pg. 9.

Gazetoj Ricevitaj.—*La Espero* (Majo), organo de la Sveda kaj Norvega Societoj.

Esperanto (Junio), organo de U.E.A. Enhavas "Milito kaj Homa Energio," de H. Hodler. "La Vojo al Daŭra Paco" jen la enkonduka paragrafo al longa artikolo tradukita de Prof. René de Saussure: "Car la pli multaj gazetoj el la militantaj kaj eĉ el la neŭtralaj landoj silentis pri tio, ni opinias utile publikigi ĉi-sube la manifeston, kiun akceptis la Internacia Kunveno, kunvokita en Hago la 7 ĝis 10 Aprilo de la Nederlanda Kontraŭmilita Unuiĝo (Nederlandsche Anti-Oorlog Raad), centra societo de la Nederlandaj pacifistoj, kalkulanta nun 14,000 membrojn kaj 700 diversajn aligintajn societojn. La internacion kunvenon ĉeestis personoj el dek diversaj landoj."—"La Internacia Informejo pri Militkaptitoj."—Tre interesaj Esperantistaj "Voĉoj el Batalkampo."

Japana Esperantisto (Marto).—En la japana lingvo kaj Esperanto.

Kataluna Esperantisto (Junio).

Le Monde Esperantiste (Juin), en la franca lingvo ka Esperanto.


La Ondo de Esperanto (Majo).—El Rusujo. Enhavas "Cu forbruligi" respondo de la Redaktoro rilate al liaj artikoloj pri la milito—"Malvarma Monstro," traduko de artikolo aperinta en "Russkija Vedomosti" pri la dronigo de la "Lusitania."—"Belgujo," artikolo de S-ro Paul Blaise, el BRITISH ESPERANTIST.—"Kiamaniere vivas naturaj lingvoj kaj Esperanto, kiel ili riĉigas kaj konservas aŭ perdas la unuecon."

Esperanto Monthly (Junio 15) enhavas News Notes, "Ekzercoj de Aplikado de la Oficiala Vortaro," de Herbert M. Scott.—Tra la Biblioteko, artikolo pri "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia," de Zamenhof, verkita angle de Wm. Harvey.—"Oni Militas," dulingvaĵo de D-ro Andreo Fisher—"Position," lingva artikolo de H. F. Cheshire.—"La Somera Suno," dulingvaĵo de G. Wilson Burn.—"Leteroj inter Amikoj," de Ad. Ŝefer.—Translator's Corner.

Vegetarano (Majo).—Oficiala organo de la "Vegetara Ligo Esperantista."

Nederlanda Katoliko (Junio).—Interesa numero kun bone verkitaj artikoloj.

La Holanda Pioniro (Junio).—Ĉefa artikolo: "Eletitaj Kantoj de Rabindranath Tagore," kun enkonduko de Walter Lippmann.

**"Esperanto Pocket Dictionary."**

EL DEKLARACIO PRI ESPERANTISMO.—*La sola unufojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo, "Fundamento de Esperanto," en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu deklinigas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj "tiel desiras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto."*

Malfermite la bonegan kaj utilegan vortareton, mi vidis unue la radikon "kapitul" anstataŭ "kapitulac" (Fundamento, pg. 39). Ĉar en la lasta "B.E." S-ro A. E. W. tre bone kaj amike aludis similajn radikojn, mi ne bezonas ripeti liajn vortojn nek trudi al kiu ajan mian personan opinion—sed—pri alia, jam kun S-ro Warden diskutita vorto "pundo," mi dezirus apelacii al la "Haga Pakonferenco" kaj lasos la jugon al ĝi.

Estas uzata en diversaj lingvoj, rilate al pezo kaj al angla monero, la sama vorto; mi donos nur kelkajn ekzemplojn:—

Angle One pound of butter one pound sterling
Norvege ... Et pund smör et pund sterling.
Germane ... Ein Pfund Butter ein Pfund Sterling
(elp: pfunt).

France Une livre de beurre une livre sterling.
Hispane ... Una libra de manteca... una libra esterlina.
Esperante... Funto da butero funto sterlinga.

Internacia ŝajnas la duobla senco; la demando estas kion elekti? kaj D-ro Zamenhof, kiu ĉiam zorge meditas kaj poste agas, elektis fari el la germana vorto "pfundo" la esperantan vorton "fundo" por ambaŭ sencoj evitigante samtempe nacian ŝaluzon. Kelkaj eĉ nun uzas "livro," sed Zamenhof ne aprobas; mi lin demandis. Nu, se li, la elpensinto de nia kara lingvo, elektis "fundo," kial S-ro Warden insistas pri la norvega (kaj dana) vorto "pundo," kiu ankaŭ havas la du sencojn; kion la Esperantistaro gajnus per alpreno de tiu vorto? Pli bone, ol enkonduki *trian* vorton, estus forpeli la jam enkondukitan, de Zamenhof ne aprobitan, tute senbezona vorton "livro," kaj sin teni al nur *unu* aprobita de Zamenhof kaj komune uzata ĉie komprenata vorto "fundo."

Mi scias, ke mia tre ŝatata amiko Warden en "pundo" estas enamiĝinta, do, por ne forpreni de li lian ĉefamatan ĉevalon, mi proponas, ke li enkonduku la radikon "pund" en alia senco, ekz.: anstataŭ "batpremi" = "to pound."

"Al tiu, kiu kun fundamentaj radikoj simumas,
Oni ĝisgalatene pundu, ĝis li ekvarumumas"
(sed oni ĝin faru tute amike!).

Ro. Ŝo (ne poeto).

**Ĉu Esperanto estas Angla-Franca?**

Nova ludo estas formebla per skribado sur karto de multo da longaj Anglaj vortoj en kiuj Esperantaj radikoj estas kaŝitaj aŭ "enterigitaj." Responda serio da kartoj kun ĉi tiuj radikoj estas preparata. La ludo estas konkursa je la formado de la plej granda nombro da paroj, aŭ prenoj, ekz. *peninsular* kaj *insul*. Tiamaniere sciado de la Lingvo Internacia, de nia propra, kaj de etimologio estas akirata je sama tempo, kaj oni realigas al si, ke Esperanto estas proksimume *sepdekkvin procento* (ne 15% kiel preserare dirita en la Junia numero) Angla. Simila ludo pruvus, ke la proporcio estas proksimume tia sama ĉe Franca lingvo.

C. G. STUART-MENTETH, B.A.

Tria Cirkulero de la XIa Universala Kongreso de Esperanto, en San Francisko, Aŭgusto 22–29, 1915.

La preparoj por la Kongreso estas jam preskaŭ finitaj. Jam de du jaroj niaj komitatoj prilaboris la preparojn por la VIII. Nacia (Usona) Kongreso, kaj ni nur bezonis ilin plivastigi, por kunvenigi ankaŭ la XIan Kongreson.

Neniam okazis Esperanta Kongreso inter tiom da allogaĵoj. La mirlando de Ameriko, Kalifornio, kun siaj gigantaj arboj, siaj vastaj valoj plenaj je tropikaj fruktbaroj, riĉega jminejoj, nemezureblajn fontojn de petrolo, kaj siaj altaj neĝkronitaj montaroj, vin akceptos. Vi estos bonvenantaj, karaj samideanoj, kaj ni ne permesos al vi bedaŭri vian alvenon.

Inter la distraĵoj preparitaj por la kongresanoj estos tuttaga ekskurso, trans la golfo de San Francisko, kies belecon egalas nur la fama "Ora Korno" ĉe Konstantinoplo, preter la sebojaj arbaroj kaj supren inter la montoj. Okazos unika balo sur la supro de monto, de kie la nekalkuleblaj multkoloraj lumoj de la Ekspoziciejo aliformiĝos en mirindan "Juvel-Urbon."

Laŭ la "Faktlibro," presita kaj dissendata de la Ekspozicia Kompanio, sabaton, la 28an de Aŭgusto, oni festos kiel "Esperanto Tago" ĉe la Ekspozicio. Je tiu tago ĉiu Kongresano povos senpage eniri la Ekspozicion. Granda demonstracio de Esperanto okazos en tiu tago, kaj la vespero estos pasigata sur la "Zono," tiu senegala strato de amuzajoj kaj distrejoj provizita je kosto de preskaŭ 25 milionoj da spesmiloj.

La unuan dimanĉon de la Kongreso, Aŭgusto 22an, okazos neformala kuniĝo de ĉiuj alvenintaj gesamdeanoj en la fama "Ora Pordega Parko," kies centoj da hektaroj da tropikaj kaj duontropikaj kreskajoj atestas en frapanta maniero la dolĉan klimaton de nia regiono.

La generalaj kunsidoj de la Kongreso okazos dum la sekvantaj tagoj, de la 23a ĝis la 27a de Aŭgusto, inkluzive. Okazos ankaŭ la kelkaj kunsidoj de la Oka Kongreso de E.A.N.A. kaj de U.E.A. delegitoj. Specialaj fakaj kunsidoj estas en preparo, por ke nia kongreso havu kiel eble plej gravan kaj vastan kampon. La ĉefaj kunsidoj okazos en la vesperoj, por ke la kongresanoj havu tempon viziti la Ekspozicion tage.

Unu vespero estos okupata de senprepara oratora konkursa, esperanta komedieto, deklamaĵoj kaj kantoj.

Ni volas denove atentigi pri la bezono de frua aliĝo al la Kongreso. Partoprenantoj devus tuj mendi sian kongreskarton kaj rezervigi al si loĝejon. Dum la monato de Aŭgusto San Francisko gastigos pli ol 250 Kongresojn, kaj estus konsilinde fari siajn arangojn kiel eble plej antaŭtempe.

La kongres-insigno estas la plej bela kaj multekosta iam preparita por Esperanta Kongreso. La kongresanoj kaj helpkongresanoj ricevos ĝin senpage, kune kun ĉiuj dokumentoj de la Kongreso, bela gvidlibro tra San Francisko, k.t.p. Aldone al tiuj dokumentoj, la helpkongresanoj ricevos senpage la kolektojn da vidajkarto de San Francisko kaj la Ekspozicio (40 kartoj kun esperanta teksto) kaj provizon da Kongresaj markoj. Oni vidos, ke ĉiuj ricevos plenan valoron por sia kotizajo.

La adreso de la Kongreso estas:

**ESPERANTO KONGRESO,
SAN FRANCISCO, U.S.A.**

LITERATURA KONKURSO.

Rememorante la malfeliĉajn tempojn, kiuj diskrevas Esperantujon, kaj la mallongan periodon por preparado, kiun ni havis, la samideanoj certe pardonos al ni, se niaj arangoj por literatura konkursa ne ŝajnas tiel bonaj, kiel tiuj de antaŭaj kongresoj.

Ni decidis proponi tri generalajn kategoriojn, kiuj espereble troviĝos sufiĉe vastaj por ke granda nombro

da konkursantoj partoprenu. Tiuj kategorioj estas la jenaj:—

1. Originala teknika aŭ beletristica proza (ĉirkaŭ 5,000 vortoj).

2. Traduko de mallonga rakonto neniam antaŭe esperantigita, prefere karakteriza rakonto de iu konata aŭtoro.

3. Poeziaĵo aŭ originala aŭ tradukita. Jugota laŭ ĝia Esperanta literatura valoro.

Por ĉiu kategorio ni dume povas promesi nur unu premion, 15 Sm. Povas esti, ke apartaj societoj kaj individuoj proponos duajn premiojn aŭ pligrandigos la premiojn per donacoj, k.t.p.

Reguloj.

1. La manuskripto devas ne montri la nomon de la konkursanto, sed nur devizon kaj la kategorian numeron.

2. La devizon kaj numeron oni ankaŭ skribu sur fermita koverta entenanta la nomon kaj adreson de la konkursanto.

3. Manuskriptojn kaj kovertojn oni sendu al "Esperanto Kongreso, San Francisko," kie oni akceptos ilin ĝis la lasta tago de la Kongreso, la 29a de Aŭgusto, 1915.

4. Dum la ferma kunsido la kongresa komitato anoncos la nombron kaj devizojn de la ricevitaj manuskriptoj, kaj tuj poste forsendos ilin al kompetenta jugantaro. La decidoj de la jugantaro estos anoncataj kiel eble plej frue en la Esperantaj gazetoj, kaj la komitato tiam sendos la premiojn al la gajnintoj.

5. La premiitaj verkoj aperos unue en **AMERIKO-ESPERANTISTO**, post kiam ili ree fariĝos la propraĵo de la aŭtoroj.

6. La nepremiitaj verkoj estos resendataj, se oni aldonos, al la koverta enhavanta la adreson, la necesan pošttagon.

PRI EKSPOZICIO DE ESPERANTAOJ EN LA KONGRESO.

La Komitatoj por la XIa Internacia Kongreso kaj la VIII. Nacia Kongreso aranĝas grandan ekspozicion de esperantaj. Ciuj eldonistoj de libroj, gazetoj, pošt-kartoj aŭ glumarkoj esperantaj estas petataj sendi al la Kongresa Komitato (D. E. PARRISH, 1350, Pine-street, San Francisko) materialon por tiu Ekspozicio. Prefere, ĉiuj objektoj kaj presaĵoj estu sendataj donace, sed se la senditaj devas esti resendataj post la Kongreso, oni tion notu sur ĉiu peco. Se senditaj presaĵoj, k.t.p., estas vendotaj por la profito de la sendinto, oni notu zorgeme prezojn kaj rabatojn. Ĉio sendita estos ekspoziciata en la urba Auditorio, kie ankaŭ la neesperantista publiko povas rigardi kaj aĉeti la aĵojn elmontratajn. Ni esperas, ke multaj firmoj uzos tiun ĉi senegalan okazon por montri siajn eldonajojn antaŭ la esperantista publiko de Ameriko!

San Francisko, Majo 24an.



Alpagoj por la Deka Kongreso.

Eble tiu ĉi pošt-karto, kiun ni ricevis antaŭ kelkaj tagoj de la Centra Oficejo, en Parizo, interesos viajn legantojn.

Estimata Samideano,

Volonte mi respondas al via letero de la 12a nuna, per kiu vi demandas, ĉu la komitato de la Deka intencas repagi la sumojn pagitajn por la ekskursoj, k.t.p. Ĉar mi jam ofte devis respondi al simila demando, mi estas komisiita de la Komitato por respondi ke: ĉiu paĝo, krom por la kongreskarto, estos post la milito repagata malpli depreno 15 % por la jam okazigitaj kaj pagitaj elspezoj al la agentejoj, k.t.p. Vi do povas diri tion al ĉiuj, kiuj troviĝas en similaj cirkonstancoj.

CEDRIC F. WHITE, Birmingham.

Grava Postmilita Invito.

La sekanta letero estas adresita al Sinjoro Harrison Hill de Rev. Richard Peek, M.A., Rektoro de la Pregejo Sankta Magnus, London Bridge, Londono.

La Pregejo Sankta Magnus-la-Martiro, London Bridge, estas unu el la plej historiplenaj el la pregejoj en Londono. La Episkopo, Miles Coverdale (Majlz Koverdejl), jaroj 1488 ĝis 1569, la tradukinto de la unua tute anglalingva Biblio estis dum kelkaj jaroj (ĝis 1566) Rektoro de Sankta Magnus-la-Martiro. En tiu pregejo estas lia tombo kaj apude estas murtableto al lia memoro.

La invito do havas altan signifon por la Esperantistoj.

ST. MAGNUS-THE-MARTYR,
LONDON BRIDGE.

KARA SINJORO HARRISON HILL,—Mi eltrovis, ke la Dimancon proksiman, la 13an de Junio, gefrataro de Esperantistoj kunvenos per studi la parolojn de Dio el la Esperanta traduko de la Nova Testamento farita de Rev. John Cyprian Rust, M.A. (Universitato de Kejmbrigo), Rektoro de Soham, Kejmbrigo.

La Episkopo, Miles Coverdale (Majlz Koverdejl), mia glora kaj bona antaŭulo kiel Rektoro de ĉi tiu pregejo, estis, kiel vi bone scias, la unua tradukinto de la tuta Biblio en la anglan lingvon. Ni estas nun en mezo de grandega milito. Tamen, tiu fakteto devus inklini niajn pensojn kaj korojn eĉ pli serioze al la studado de la Sanktaj Skriboj.

Dio regas inter la nacioj, kaj Li, laŭ la bontempo, ĉesigas la nunan militon.

Pasos pli longa aŭ malpli longa tempo antaŭ la deklaro de Paco. Tamen, kiam ajn tiu momento alvenos, ŝajnas al mi dece, ke Diservo en la internacia lingvo okazu en ĉi tiu pregejo.

Do, se la Episkopo de Londono permisos, mi havas grandan plezuron peti vin, ke vi la proksiman Dimancon, transdonu al la kunvenintaro, kaj per ili al ĉiuj Esperantistoj tra la tuta mondo, ĉi tiun inviton de la Rektoro de Sankta Magnus, ke tiom, kiom povos ĉeesti, kunvenos je la unua oportuna tago post la deklaro de paco, por danki Dion.

Ankaŭ, mi kuraĝas proponi, ke ĉar Majlz Koverdejl donis al la anglo-saksa gento la Biblion anglalingvan, estus dece, ke la tradukinto de la Nova Testamento en ia esperanta lingvo prediku dum tiu diservo—se tio estos arangebla—per la internacia lingvo, en la predikejo de Majlz Koverdejl.

RICHARD PEEK, Rektoro.

Tiun gravan kaj signifoplenan leteron Sinjoro Harrison Hill legis antaŭ la kunvenintaro Dimancon p.t.m., Junio 13. Ili varmakore akceptis la inviton kaj aprobis per montro de manoj la jenan respondon:—

Al la Respektoginda RICHARD PEEK, M.A. (Universitato de Kejmbrigo), Rektoro de Sankta Magnus-la-Martiro, London Bridge.

RESPEKTEGINDA KAJ TRE ESTIMATA SINJORO,—La Esperantista gefrataro, kiu kunvenis posttagmeze Dimancon, la 13an de Junio, 1915, por la studado de la parolo de Dio el la esperanta traduko de la Nova Testamento, farita de Rev. John Cyprian Rust, M.A. (Universitato de Kejmbrigo), el profunda koro dankas vin, la posteulon de la glora Majlz Koverdejl kiel Rektoron de la pregejo Sankta Magnus-la-Martiro, por la kortusanta invito, kiun vi sendis al ni, atesti Diservon en la historiplena pregejo, St. Magnus. Tiun inviton ni danke akceptas, kaj ni prenas sur nin la solenan devon disvastiĝi kiel eble plej vaste tra la mondo tiun noblan inviton. Ni certigas al vi, sinjoro, ke via letero estos legitima de niaj samideanoj en multaj landoj, militantaj kaj neŭtralaj, kaj, kie ajn ĝi estos legitima, ĝi ekvekos en la koroj la esperon al paco.

En la nomo de la kunvenintoj,

HARRISON HILL,

Vicprezidanto de Brita Esperantista Asocio.

Noto al la Redaktoro de "B.E."—Vi povas aldoni, ke la pregejo de St. Magnus estas de tempo al tempo la okazejo de tre gravaj diservoj, ekzemple unufoje ĉiuare la Lordurbestro de Londono, akompanita de siaj skabenoj kaj Konsilantaro, ĉeestas diservon en tiu pregejo en plena ceremonio.

Al tiu pregejo iris Sir Vezey Strong dum la kronadaro de Georgo V., kiam li estas la Lordurbestro de Londono, kaj, starante apud la monumento de Majlz Koverdejl parolis pri tiu bona Episkopo kaj pri la grava influo, kiun havis la Biblio sur la tuta anglo-saksa gento kaj en la tutmondo.

La pregejo Sankta Magno estas vera kerno de historio, kie centrigas altaj pensoj el multaj jarcentoj.

Tiu malnova pregejo akiras tute novan signifon per la internacia dankodiservo, kiun antaŭvidas la bona Rektoro. Tiu diservo espereble povos esti la unua de longa serio de internaciaj diservoj en tiu pregejo. La pregejo de Majlz Koverdejl devus esti mondcentro por la internacia disvastigado de la principoj, kiujn instruis la Kristo, sed kiujn la homaro ankoraŭ ne sufici komprenis, nek akceptis.



Vegetara Ligo Esperantista.

Samliganoj!

Revokita el Milano al Hamburgo, la redaktoro de nia organo, S-ro OSCAR BÜNEMANN, kun granda bedaŭro devis momente forlasi sian taskon kaj transdoni la eldonadon de *Vegetarano* en neutralan landon, el kia plej multon el la diversnaciaj samcelanoj estos atingebaj. La redakcia adreso nun estas: *Bemuurde Weerd, O.Z. 32, Utrecht, Holando*.

Sed, por inde daŭrigi nian valoran interligilon kiel ankaŭ por repagi ŝuldatajn elspozojn al ĝia diligenta iniciatinto kaj eldoninto ni bezonas moralan kaj financan subtendon. Pro tio, spite la krizaj tempoj, ni alvokas la helpon por la nova societjaro 1915-16 de ĉiuj liganoj, de ĉiuj interesatoj kaj samideanoj, konsentaj kun ni, ke la gravaj etikaj movadoj nepre ne devas malvigli, kontraŭe, starigi, des pli firme, ju pli premadas la detruemo de la mondumilito.

Alten la korojn kaj... obstine antaŭen!

MARIA VAN REES.

Al Vegetaranoj.

KARAJ SAMIDEANOJ,—Pro la foresto en Francujo de S-ro J. A. GILL, mi akceptis provizore reprezentant la Vegetaran Ligon Esperantistan en Granda Britujo. Mi do petas, ke ĉiu Esperantista vegetarano aŭ vegetaraniĝemulo rapidu sendi al mi unu spesmilon kiel ankotizajon al la V.L.E. por la jaro ĵus komencigonta. Ĉiu ano ricevos la "Vegetaranon," kiu gazeto regule aperas, malgraŭ la milito. Mi kredas, ke la afero meritas pli multe da subteno, ol ĝi nun ricevas; kaj mi hontas, ke oni povas diri ke en Anglujo, la patrujo de la vegetarismo, ŝajne troviĝas nur kvin Esperantistaj vegetaranoj!

MONTAGU C. BUTLER,
18, Leigh-road, Highbury, London, N.



Donacoj por la Helpo de la Belgaj Rifugintoj en Holando.

SESA LISTO.

Antaŭa sumo (paĝo 85)	£30 18 3
S-ino M. Hardie (per H. R. C., Birkenhead Esp. Group)	0 10 0
C. H. W., Barrow	0 1 0
	£31 9 3

Protesta Letero.

SAMIDEANOJ!—En la Junia numero de la BRITISH ESPERANTIST aperis letero de S-ro Erhard Urban, Bohemo, kelkjara Londona samideano, pri liaj spertaj kiel civilkaptito en Francujo. Mi ne postulas favoron, nur saman rajton. Do bonvole ankaŭ permesu al mi sciigi miajn spertojn kiel neinternigita maljuna germana laboristo en Anglujo. Tri semajnoj post la militdeklaro mi perdis mian laboron pro manko de materialo. Mi estas dompentristo. De tiu tempo mi laboris nur okaze. En Januaro mi malsaniĝis kaj dum kvar semajnoj mi devige restis en la lito.

Cu mi mortis de malsato? Ne! Dankojn al miaj kelkaj anglaj laboristaj amikoj, kiuj tre bone scias, ke mi estas germano, kaj malgraŭ tio, helpis kaj kuraĝigis min ĉiumaniere. Ofte kiam mi pensis forlasi ĉi tiun malbelegan mondon, ili konsolis kaj rekuraĝigis min, dirante, "ne malesperu, ni trovos por vi pecon de pano kaj, se oni internigos vin, ni zorgos pri via maljuna edzino."

Eble tio mirigos vian korespondanton S-ron Erhard Urban, absoluta Bohemo. Se la legantoj ne komprenas tion, pri kio mi aludas, ili relegu la finan parton* de la artikolo de S-ro Erhard Urban en la Junia numero de la BRITISH ESPERANTIST pri liaj samnacianoj, pri liaj samsanganoj, pri la plej ekstrema malsato jam de pratempo por la germanoj, pri la karaj kaj amataj rusaj, serbaj, belgaj, francaj, anglaj kaj montenegraj fratoj.

Kial li ne alkalkulas al sia frataro la karajn kaj amatajn italajn fratojn? Kompreneble kiam li skribis sian leteron, la itala registaro ankoraŭ ne estis deklarinta militon al Germanujo. Do estis duba, ĉu la itala popolo apartenas al la kara kaj amata frataro. *Amo kaj malamo oficialaj. Homaj pasioj faritaj en registara fabrikejo.*

Cu ni neniam komprenos, ke Dio aŭ la naturo donis al ni cerbon, por ke ni uzu ĝin? Kaj estas nur per nia intelekto, ke ni superas la bestojn. Cu ni neniam komprenos, ke amo aŭ malamo estas afero de koro, de inklino, sed neniam povas dependi de la lingvo, aŭ de la lando aŭ de la haŭtkoloro de l' individuo. Tamen mi flankiĝas. Mi volis paroli pri miaj spertoj kiel alilandulo malamika? en ĉi tiu lando. Mi evitis plej eble ĉiajn malagrablojn, kaj ricevis multajn sincerajn signojn de amikeco. Mi kuniĝis kun anglaj, rusaj kaj francaj laboristoj kaj eĉ kun unu belga rifuginto. Ni racie kaj amike priparolis la teruran katastrofon, kiu nuntempe agitadas la mondon kaj konkludis, ke tio ne estas per nia kulpo. Jam de pli ol tridek jaroj, parolante pri alilandanoj mi uzas vortojn nur tiajn: miaj anglaj, francaj, rusaj, turkaj, germanaj kamaradoj. Malgraŭ la milito, spite ĉio, ili estis, estas, kaj estos miaj kamaradoj.

KARAJ GEESPERANTISTOJ.—Kiam via konscienco, via suprema juĝisto postulas respondon koncerne vian kulpecon aŭ senkulpecon pri la milito, kian respondon vi donos. Kiam revenas Kristnasko, la naskiĝtago de la Princo de la Paco, vi laŭ kutimo donacas ludilojn al viaj infanoj, ĉu vi donacas militludilojn al ili? metal-soldatojn? pafletojn? k.t.p. Jes? Do vi estas kulpaj. Vi kreas, instigas kaj kuraĝigas la milit-spiriton ĉe viaj infanoj.

Je tio mi honeste pledas nekulpecon.

Pro amo al la homaro.

Via tute internacie,

FRANK ZOCHER.

La Sennomaj kaj la Famaj.

Du specojn da esperantisto ni havas en nia movado: esperantistojn "sennomajn" kaj esperantistojn "famajn," vicajn soldatojn kaj generalojn.

La unuaj, esperantistoj sennomaj, estas laborantoj, pri kiuj nenie estas skribate aŭ legate, neniu elparolas iliajn nomojn kun admirio aŭ envio; iliaj nomoj restas al la tuta mondo de mondlingvistoj nekonataj, ili ne estas skribataj en memorlibroj enhavantaj historion de la lingvoj internaciaj, iliaj nomoj ne estas engravuritaj en la monumentoj, kiujn starigis entuziasmo kaj amo al nia sankta afero—ili estas kaj restos sennomaj kaj senfamaj.

Ili estas la homoj, kiuj dum la tuta tago sidas kurbiĝintaj en kancelarioj aŭ laboregas ĉu en laborejoj aŭ lernejcambroj, ilia vivtasko estas sento de malhavo, laboro kaj batalo je peco da pano; ili estas homoj, al kiuj fatalo, krom dumviva batalo je nura ekzisto, donis ankaŭ amon al la homaro, kies filoj ili sin sentas, kaj senton de deva zorgo pri pli bona estonteco sia kaj tiu de la estontuloj.

Kaj tiuj homoj revenas vespere lacigitaj korpe eĉ spirite en siajn loĝejojn kaj senripoze reeliras, rapidas en klubejojn kaj kursejojn, gvidas kursojn, instigas, propagandas, lernas kaj samtempe instruas. Ili estas tiuj internaj laborantoj, kiuj prizorgas ĉiun laboron en niaj societoj kaj kluboj, ili estas memvolaj senpagaj adresskribistoj, multigistoj de niaj presaĵoj kaj kurieroj, ili estas tiuj niaj kulioj, al kiu ni eĉ ne donas la plenmanon da rizo, kiun eĉ hina kulio energie postulas.

Kaj krom tiuj ĉi ni havas ankaŭ niajn "famajn." Iliaj nomoj vi trovos en ĉiuj gazetoj, eĉ engravuritaj sur monumentoj per oraj literoj, ili estas vokataj en ĉiujn honorajn komitatojn de niaj kongresoj, laŭdire ili estas eĉ ornamajo de nia movado. Inter ili estas kronitaj kapoj, kiuj eĉ ellernus Esperanton, se ili havus tempon por tiom fari. Inter ili estas ankaŭ hierarhoj, kiuj iam ie al iu promesis arangi esperantan predikon.

Sennomuloj kaj famuloj...

La sennomaj, ne eniu al la famaj! La estonteco apartenas al veraj laborantoj. Vi, laboristo, malaltstra ĉa oficisto, studento aŭ instruisto, kiuj faras la laboron de esperanta kulio, kiu scipovas eĉ malsati nur por ke vi povu dediĉi la ŝparitan sumon por la propagando de la afero, kiu fariĝis al Vi kara, al Vi apartenas la estonteco! La spiritrevolucio, kiu renversos putrigintajn opiniojn de niaj malamikoj venos certe de mal-supre kaj taksanto de Via laboro estos la estonteco. Kaj ne parolu kontraŭ niaj "famaj."

Ili estas por konservi "dekorumon."

El *La Kulturo.*



The Birthplace of Zamenhof.

"The station was a regular Tower of Babel. Russian, Polish, White Russian, Lithuanian peasant women talking the old Aryan idiom so dear to philologists, and that little knot of women beside them—can it be German they are talking? No, they are Jewish, and are talking Yiddish, a Germano-Hebraic dialect the sound of which reminds one of the Switzerdutch of St. Gall. What a mixture of races in that corner of the earth! Suddenly it flashed upon me that Bielostok was the birthplace of the inventor of Esperanto!"—EDMOND PRIVAT, Special Correspondent of *The Daily News*, May 20, 1915.

* [Tute prave nia amiko protestas. La aluditajn paragrafojn ni plene intencis forstreki, sed bedaŭrinde forgesis. Pardonon!—RED., B.E.].

Esperanto and the War.

Translated from the Danish by MISS PECKOVER.

Among the international movements that of Esperanto certainly has a special place during the present War. Not only have Esperantists lifted high the ideal banner through this fearful time, but have held out to one another their hands amid war's dislocation of international life ; and their cause has reaped advantage and won a progress which in fact many years of propaganda work could not effect. Not for a moment has the link between Esperantists of different lands been broken, and no hatred has been cherished on either side, not even between Germans and English Esperantists.

The language as a means of mutual understanding, and not belonging to any particular nation, contributes powerfully in breaking down the barriers that separate mankind. Only the Esperantist knows to the full the feeling that springs up when, standing upon the mutual language foundation face to face with a stranger, he can by its power overlook his nationality and see a man and a brother. Brotherhood is not only talked about, but practised by Esperantists.

That this is no idle talk is shown by the mutual help which Esperantists have given to one another during the War. Hardly ever have adherents of the numerous ideal movements so rapidly and directly given active help to their fellow-members as they. To mention only what the French Esperantists did for the foreigners who had come to Paris in connection with the Universal Congress ; the protection which the German and Austrian Esperantists enjoyed certainly did not fall to the lot of many of their countrymen in the French capital.

The neutral countries have, of course, played an important part as stations for search and inquiry. Copenhagen has borne her share of the burden, and our office was perhaps the first to set systematically to work. It was especially Germany, Russia, and Belgium which turned to Copenhagen. The office worked especially with committees and offices in Kiev, Moscow, Berlin, and Dresden respectively. Researches in Belgium were mainly by telegraph, and the office succeeded in finding many Polish Jews who were studying in Belgium and Germany, for, as is well known, they cannot enter Russian Universities. We may add that Consuls and Ministers were unable to find these men.

It is true our office found it much easier to work with Germany. In Russia the language threw great hindrances in the way ; you simply cannot understand the prisoners, and consequently they disappear and no one knows where they are or what are their names. It

is otherwise with Esperantists, who are always concerned to meet this man or that, and can understand them, especially now that the War Office enforces the teaching of Esperanto. The tie which binds us all together renders us always willing to help one another even in enemy countries. Therefore, it is easier to seek after and trace Esperantists.

Paris and Geneva may also be named as centres of the search for the lost ; the Universal Esperantist Association headquarters has done a great work. In November, to give numbers, the office cared for 7,664 letters in and out, and in December for 14,935.

Space forbids us to give reports of even some of the many directions in which Esperanto has been of incalculable value to many in the field. Here is but one example of the sympathy Esperantists feel for one another, and it stands almost unique in the history of war. A German Esperantist prisoner at some period of the journey to Siberia became the attendant on a Russian officer, also an Esperantist.

The necessity for a common neutral language has, anyway, brought Esperanto to the fore in the soldier ranks. In the prisoner camps there is compulsory teaching of the language. French Esperantists have arranged that Esperanto text-books should be sent from Germany to the German prisoners, and now the Germans reciprocate by asking for French manuals for the French prisoners. In many camps there are Esperanto interpreters, while Esperanto is allowed as a correspondence language to the prisoners.

There is much talk about the impossibility of taking up again international co-operation, and that international congresses will be impossible at first. There may be something in it, particularly as respects professional congresses. Language, which has always placed hindrances in the way, will probably in a still greater degree act as a separative factor. Here Esperantists will be a whole head in advance. In the power of one uniting, gathering tongue nationalities are forgotten.

In the midst of war we already talk in an undertone about where the next congress is to be held. German Esperantists even ask the French to renew their invitation to Paris, and they will come. But the first congress can hardly be held in one of the belligerent lands ; it must naturally be in a neutral land ; and who knows whether Denmark may not be designated to receive this Esperanto World Congress, the 10th in order, which will certainly be a Peace Congress in the best sense of the word ?

From the Bureau for International Co-operation (Opretholdetse of Internationalt Samvirke), No. 4, Copenhagen.

Unu el Miloj.

Duonkušante, duonsidante li apogis sin kontraū maljuna saliko, kiu klinis siajn branĉojn super li, kvazaŭ ĝi volis ŝirmi lin kontraū malamikoj.

La kampo estis forlasita. Oni nur aŭdis la kriojn de kelkaj korvoj, kiu flugis malrapide kaj solene super la detruita regiono. La suno jam subiĝis, kaj malseka, malvarma nebulo ekkovris la ĉirkaŭajon.

La terura krakado de pafiloj, la tondrado de l' kanonoj, ekscitantaj tonoj de l' trumpetoj, la kriegantaj voĉoj, la mortkrioj de l' vunditoj kaj la ĝemadoj de mortantoj, ĉio estis silentiĝinta.

Antaŭ kelkaj horoj li staris en la unuaj rangoj, li pafis, pikis, frapis, ĝis fine li sentis brulantaj doloron en sia brusto, lia pafilo ekfalis el liaj manoj, li mem ŝanceligis kaj falis teren. Helpe de ĉiuj fortoj, kiu restis al li, li fortrenis sin ĝis la bordo de rivereto en la proksimeco. Li malvarmigis sian frunton kaj tremantajn manojn, malbutonumis sian dikan palton kaj rampis al sole staranta arbo.

Tie li restis, rifuginta kontraŭ la vento per malgranda arbetaro. Fine li svenis de doloro kaj laceco.

Kiam li vekiĝis la bruego estis for. Li estis tute sola. Ne—en la proksimeco li vidis kelkajn formajojn: estis soldatoj kiel li, eble mortintaj, eble ankoraŭ vivantaj.

Ho ve! Estis kvazaŭ li vivis en revo dum la lastaj monatoj. Kiam la milti komenciĝis, li estis vokata el la patra domo por defendi sian landon; li devis forlasi siajn familiulojn.

La lastan vesperon antaŭ lia foriro ili estis kune en la antikva ĉambro, kie la granda, ligna krucifikso pendis al la nigra muro, kaj la statueto de la Sankta Virgulino staris en la malluma angulo sur tabuleto apud la ŝranko. Ili preĝis la rozarion kaj la litanion, kiel ili kutimis. Patro antaŭpreĝis kaj la aliluloj respondis. Pie sonoris tra la malalta ĉambro: Patrino de bona konsilo, preĝu por ni. Virgulino potenca, p.p.n. Konsolantino de l' ĉagrenuloj, p.p.n.

Kaj kiam li estis en lito, lia panjo venis, ĉirkaŭbrakis lin kaj donis al li medalion de la Sankta Patrino, dolĉe dirante:

“Joĉo, filo mia, prenu ĉi tiun medalion kaj preĝu al la Patrino de Doloroj, kiam vi estos for. Preĝu kune kun ni, por ke ŝi revenigu vin mezen de ni.”

Tiam ŝi kisis lin kaj eliris plorante. Kaj li... li kaſis la kapon en la kusenon kaj ploris ankaŭ, ne el timo por ebla morto, ne el malkurageco, sed liaj sentoj estis tro fortaj por li. Ĉion li devos forlasi: sian ameman patrinon, kiu gardis lin, kiam li ankoraŭ estis junia, kiu flegis lin, kiam li estis malsana, kiu volus doni ĝin sian

vivon por li; sian patron, la seriozan kamparanon, kiu laboris frumatene kaj vespere por gajni la panon ĉiutagan por siaj infanoj; kiu prilaboris la kampon, semis, sarkis, kaj rikoltis sub la brulanta suno la fruktojn, kiujn la Sinjoro kreskigis; kiu diris kiam komenciĝis la milti: “Iru postmorgaŭ, Johano, kaj batalu kuraĝe por via lando,” siajn gefratojn, konatulojn, kiujn li devos forlasi. Kaj meze en la nokto li suprensendis koregan preĝon por siaj geamatoj.

La sekvintan tagon li foriris kun siaj kamaraðoj. Li venis en granda militurbo, kie li nur vidis soldatojn, kanonojn, pafilojn. Post kelkaj tagoj lia regimento forveturis al la batalejo. Li trapasis nekonatajn regionojn, kie la homoj staris al la stacidomoj por ekscite saluti la batalontojn, kie virinoj plenigis lian poŝon kaj manojn per cigaroj kaj refreſigajoj. Fine li atingis sian destinejon.

Kaj tiam la mizero komenciĝis!

Kaſite en tranĉeoj aŭ detruitaj domoj, ĉiam preta por ataki aŭ defendi, dum la ŝrapneloj diskrevis super la kapo, la kugloj el la maſinpafiloj trafajis la aeron, la flugmaſinoj eljetis la terurajn eksplodaĵojn kaj la tondrado de l' grandaj kanonoj neniam silentiĝis, liaj nervoj tiel ekstreĉis kvazaŭ ili volis rompiĝi. Kiam li dormis, la trumpetoj eksonoris; Nigraj formaĵoj moviĝis proksime, helaj radioj el la serĉlumo svingis tra la kampo, kaj la pafoj tratondris la nokton. Ofte kiam la soldatoj tage batalis kontraŭ akvo, malvarmeco kaj aliaj malkomfortoj, venis vespere la komando esti pretaj por ataki. En la mallumeco ili iris antaŭen ĝis la teruraj baroj de pintfadeno, kiujn kelkaj el la kamaradoj tratranĉis, kaj nevidite ili atakis la malamikon aŭ ĉi tiu estis rimarkinta ilin kaj sendis pluvegon da kugloj en iliajn rangojn...

Ho! Kiam li kuſis tie sub la arbo, ĉio, kion li travisis la lastajn monatojn pasis antaŭ liaj okuloj kvazaŭ kiel filmo... kaj nun la fino estis venanta.

Li bone sentis tion. Malrapide, tre malrapide forfluis kun la varma sango la vivo el liaj vejnoj.

Li estis tute kvieta.

Nur kelkfoje li konvulsiis, kiam la doloro fariĝis tro forta.

Lia malforta mano serĉis la medalion, kaj malfacile li eltiris sian rozarion el la poŝo.

Dolē moviĝis liaj lipoj, kaj neaŭdeble la koraloj traglitis liajn fingrojn: “Preĝu por ni, pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto.”

Tiam li mortis.

La sekvantan tagon liaj kamaradoj trovis lin. La militpastro resendis la medalion kaj la rozarion, kiujn li tenis en la fingroj al liaj gepatroj kun mallonga letero de kompato kaj konsolo.

El *Nederlanda Katoliko*.

G.B.

Jesuo Parolas.

Infanoj, ho infanoj miaj !
 Ĉu vi ne aŭdas min vokantan ?
 Leviĝu la okuloj viaj.
 Aŭskultu, aŭdu min ĝemantan.

Tre multajn petojn mi ricevas
 Kaj pregojn de la tuta mondo,
 Ĉar ĉiu nesciante revas
 Benota estas lia rondo.

Soldatoj baldaŭ batalontaj
 Vundontaj unu la alian
 Petegas, laŭte min vokantaj,
 La helpon kaj la benon mian.

Kaj ĉiu kredas sin la prava,
 Ĉar sankta estas la afero,
 Proklamas la venkigon sklava,
 Semante pacon sur la tero.

Infanoj ! Viaj vortoj pikas
 La koron mian sangadantan,
 Kaj viaj pregoj ne efikas,
 Mi aŭdas pregon nur amantan.

“ Pardonu ” estis mia vorto,
 “ Pardonu miajn malamikojn.”
 La amo estas vera forto,
 Kaj sole havas ĝi efikojn.

Ho ĉesu, infanetoj miaj,
 Ho ĉesu vian bataladon ;
 Atingas min ne vortoj viaj,
 Mi ne aŭskultas malamadon.

Denove vi min nun krucumas
 Per akra glavo min tranĉante,
 Ne miajn vortojn vi plenumas,
 Kunhomojn tiel mortigante.

DOROTHY MATTHEWS.



Bona Bogdihano.*

(El “Cent Oraj Hinaj Fabeloj”).†

De V. DOROŠEVIĆ.

Bogdihano Fan-Gin-Dzjan, alnomita de historiistoj Mun-Su,—kio signifas “ patro de popolo,”—estis bonkora bogdihano kaj zorgadis pri la popolo.

Ciufoje, kiam al li venis famoj, ke ie vic-reĝo premegas la regatojn,—li tuj alvokis la vic-reĝon kaj ordonis al la ekzekutistoj :

— Nu, forprenu de ĉi tiu bravulo la kapon. Mi esperas, ke oni rekonos lin en la alia mondo ankaŭ sen la kapo, nur laŭ liaj abomenajoj.

Kaj li tuj instalis, anstataŭ la ekzekutita,

* Bogdihano estas mangola titolo de fina imperiestro ; ĝi signifas—granda reganto.

† Ĉi tiuj fabelojn oni rakontas al fina imperiestro en lia infanago.

alian vic-reĝon, la plej bonan,—kiun konsilis al li la konsilistoj kaj ministroj.

Li mem ĉiam legis ĉiujn raportojn de la vic-reĝoj.

En la raportoj estis skribate, ke Hinujo troviĝas en bonstato tiel, ke eĉ la historio ne povas montri similan tempon,—la suno lumas mirinde perfekte, ĝustatempe pluvias, kaj la logantoj ne scias, por kio uzi la superfluon da rizo.

La bogdihano legis ĉion ĉi kaj pensis :

— Ĉu tio estas vera ? Ĉu ili ne mensugas ?

Kaj jen venis al li en la kapon ideo.

Li ordonis al ĉiuj siaj ministroj, konsilistoj kaj korteganoj kunveni en destinita tago en la palaco, li mem sidigis sur la tronon kaj deklaris :

— La vic-reĝoj sciigas, ke nia Hinujo troviĝas en bonstato, kaj ke la hinoj eĉ ne scias, por kio uzi la rizon. Zorgante pri nia popolo ni decidis pripensi tion, pregi la diojn kaj demandi la praavojn : kion oni devas fari el la neformanĝita rizo, ke tio servu por la utilo de l’ popolo. Tial ni de nun forigas en la internajn ĉambrojn de nia palaco kaj nin okupos pri preĝadoj, meditadoj kaj spiritaj interparoladoj kun la praavo. Sed ĉar, dank’ al la dioj, estis ne malmulte da niaj praavoj,—do ni opinias, ke pasos ne malpli ol tri lunoj * antaŭ ol ni finos nian interparoladon kun ĉiuj senescepte, por ke ni ne ofendu iun el ili. Kaj jen,—en la daŭro de tri lunoj ni malpermesas al ĉiu maltrankviliĝi nin kaj aperi en la palaco, kiu ajn li estas. Tri lunojn ni restos ne videbla por kiu ajn, krom la ĉielo !

La ministroj, konsilistoj kaj korteganoj ekloris la sagecon de la bogdihano kaj disiris el la palaco, ĝojante.

Sed la bogdihano dume alvokis siajn sindonemajn servistojn, revestis sin kaj ilin per vestoj de almozuloj, nerimarkate eliris el la palaco kaj ekiris migri tra Hinujo, por sciigi, ĉu la vic-reĝoj skribas la veron en siaj raportoj, kaj ĉu efektive la popolo tiel bonfartas, kaj ĉu efektive la fina popolo estas ravigita de la regantoj.

La unua provinco, kiu estis sur la vojo de l’ bogdihano, estis Pe-Ci-Li.

Veninte tien, la bogdihano kun siaj kunkmigrantoj venis al unu domo kaj petis :

— En la nomo de viaj praavoj, per siaj virtoj ornamintaj la teron kaj nun ornamantaj la ĉielon, donu plenmanon da rizo al mizeruloj mortantaj pro la malsato !

Oni respondis al li :

— Jugante laŭ tio, ke vi estas almozulo, evidente vi estas el nia provinco kaj regato de

* Konforme al la moro de hinoj kalkuli la tempon ne per monatoj, sed per lunoj.

nia vic-rego. Sed jugante lau tio, ke vi petas, ke ni donu al vi—vi devas esti de ie malproksime. Tial foriru de ni, nekonata homo.

La bogdihano kun la kummigrantoj venis al alia domo.

Tie oni respondis al li je la peto pri plenmaneto da rizo :

— Nebone estas moki fremdan malfelicon !
Kaj forpelis.

En la tria domo je la peto pri rizo la gemastroj nur ekploris.

Kaj en la kvara ce la vorto " rizo " la mastro levis la kapon kaj demandis :

— Sed kio gi estas ? Cu mandareno aui besto ?

Ekridetis la bogdihano kaj diris :

— La vic-rego de Pe-Ci-Li skribas la veron. Efektive, se oni donus al ci tieaj logantoj rizon,—ili ne scius kion fari el gi : ili, sajnas, neniam vidis rizon.

Kaj li komencis ciumatene iri en templojn kaj auskulti, kion parolas kaj kion petegas la popolo.

La stomakoj de finoj estis malplenaj, sed la temploj—plenaj.

En ciuj temploj estis amasoj da pregaro. Kaj ciuj ripetadis la solan pregon :

— Niaj sanktaj praavoj, petegu la cielon, ke gi inspiru al nia saga, nia bonkora, nia zorgema bogdihano Fan-Gin-Dzjan la bonegan ideon forhaki la kapon de nia vic-rego Tun-Fa-O. Tia fripono, tia rabisto ankorau neniam estis en la mondo.

Tiel pregaris ciuj homoj en ciuj temploj,—kiam subite foje, veninte frumatene en templon, la bogdihano ekvidis maljunulon pregarant speciale varmege.

Ciuj varmege pregis, sed la maljunulo plej varmege.

La bogdihano alproksimigis, por subauskulti la pregon de l' maljunulo kaj ekaudis :

— Niaj sanktaj praavoj,—pregis la maljunulo—inspiru al nia bonkora, sed maltrankvilema bogdihano Fan-Gin-Dzjan, por ke li lasu Tun-Fa-O kiel nian vic-regon por tre multaj jaroj. Kaj donu la cielo, ke Tun-Fa-O vivu gi la profunda maljuneo, kaj ke poste li komencu vivi denove.

La bogdihano estis treege mirigita kaj, kiam la maljunulo finis sian pregaron, demandis :

— Diru, honorinda maljunulo, verajne Tun-Fa-O faris al vi ion precipi bonan, ke vi pregas por li ?

La maljunulo nur ekridetis.

— Ankorau ne estas naskita la patrino de l' patrino de tiu homo, al kiu Tun-Fa-O faros ion bonan. Oni tuj povas konkludi, ke vi ne estas ci tiea,—alie vi ne demandus tiel malsage.

— Nu, eble, Tun-Fa-O tiel placas al vi,—demandis la bogdihano, lau sia staturo, eksterajo ? Cu vi lin vidis ?

La maljunulo faris pregaron al la praavo.

— Dank' al dioj nek mi lin, nek li min iam renkontis !

La bogdihano tute estis embarasata.

— Kial do vi pregas por li,—kiam ciuj en ci tiu provinco ciam pregas, ke la bogdihano plej baldau forhaku la kapon de Tun-Fa-O ?

— Ha, estas pro tio,—respondis la maljunulo, ke ili estas ankorau junaj kaj malsagaj, ili ne estas spertaj. Sed mi sub tria vic-rego vivas. Ni havis vic-regon Cu-Li-Ku ; li estis avida homo, kruela homo, tiam gemegis nia provinco. Nu, ni pregaris la cielon de la mateno gi vespero : " Forhaku la bogdihano la kapon de Cu-Li-Ku ! " La cielo atentis niajn pregarojn, gi inspiris al la bogdihano tiun ideon. La bogdihano—invitis Cu-Li-Ku en Pekin'on kaj ordonis forhaki lian kapon, kaj sendis al ni kiel vic-regon mandarenon Ksang-Hi-Tu. Ankorau pli avida estis Ksang-Hi-Tu, ankorau pli kruela. Ankorau pli multe ekgemis la provinco Pe-Ci-Li, kaj ni denove komencis pregi la diojn, por ke ili ree inspiru al la bogdihano la ideon forhaki ankau la kapon de Ksang-Hi-Tu. Denove la cielo atentis niajn pregarojn,—invitis la bogdihano al si ankau Ksang-Hi-Tu kaj forhakis lian kapon, sed al ni sendis nunan Tun-Fa-O, longigu la cielo lian vivon por tre multaj jaroj. Se oni trairos la tutan provincon laulunge kaj laularge, eci tiam oni ne vidos solan kontentan vizaon, nek renkontos solan satan homon.

Ni semas larmojn anstatau rizo kaj elkreskas malgojo. Jen la popolo pro sia malsageco petegas la cielon, ke gi inspiru al la bogdihano la ideon forhaki la kapon de Tun-Fa-O. Sed mi estas maljuna homo, mi timas, ke la cielo efektive plenumos ilian peton. Se la bogdihano forhakos la kapon de Tun-Fa-O, li sendos al ni alian. Sed la alia povas montri ankorau pli malbona kvankam mi opinias, ke neniu povas esti pli malbona ol Tun-Fa-O,—nu, tamen oni ja ne povas konfirmi tion ! Ne, estos pli bone, se restos ci tiu, longigu la cielo lian vivon dum tre multaj jaroj.

La bogdihano afliktigis, auskultinte ci tiun rezonardon, li eci ne daurigis sian migradon tra la aliaj provincoj, revenis Pekin'on kaj eniris la palacon.

Li alvokis siajn ministrojn, konsilistojn kaj korteganojn kaj diris :

— Nia konsiligo kun la praavoj dauris malpli longe ol ni supozis,—car niaj praavoj sin montris koncizaj rilate al siaj konsiloj kaj donis al ni ciuj, kvaza u per unu voco, solan

prudentan konsilon: en la sekvonta tempo, kion ajn oni parolas al ni pri niaj vic-reĝoj, kiaj ajn famoj pri ili venos al ni,—ke ni neniam ŝangū ilin. Estu tiel!

Kaj ĉiuj gloris la sagecon de l' bogdihano.

Kaj la vic-reĝoj precipi.

Sed la saĝa maljunulo el la provinco Pe-Ĉi-Li pleje.

El rusa lingvo tradukis MAKSIM BULOČKIN.

◆ ◆ ◆ ◆

La Argenta Muso.

(EL ITALA ALMANAKO).

Ni legas en la Sanktaj Skribajoj, ke Dio punis la Filiștojn, kiuj estis forportintaj la Keston de la Atesto, sendinte en iliajn landojn multegon da musoj, kiuj ĉion detruis. La Filiștoj por elpagi sian malrespekton al Dio, kaj por elliberiĝi el tia Dia skurĝo metis sur la ĉaron, alkondukantan la Keston al la Hebreoj, malgrandan kofron, en kiun ili estis enfermintaj kvin orajn musojn.

En Elzaso, apud Kolmar, sidas, inter montoj kaj sur ensorĉa loko, malnova sanktejo, dediĉita al la Tre Sankta Virgulino sub la nomo de "Nia Sinjorino el la tri Spikoj."

Antaŭ ne longe, altrangulo ĉe la Elzaso-Lorena gubernio ekskursadis inkognite la montojn Vogezajn por ekscii, ĉu la germaniĝo de la enlanduloj bone progresadis. Alveninte apud Kolmar'o lin ekfrapis la bela loko de l' fama Sanktejo. Gvidata de maljuna preĝeja servisto nia germana oficiro eniris la preĝejon, kies muroj malaperis sub ega nombro da religiaj oferdonoj. La oficiron mirigis argenta muso pendigita meze de tiuj donacoj, kaj scieme li demandis sian gvidiston pri la kialo de tiu besta ĉeestado.

"Iam"—klarigis la preĝeja servisto—"sub la bona reĝo Stanislao niaj kamparoj estis dezertiĝintaj pro vizito de legionoj da musoj, kiuj ĉion detruis, ĉion mangegis. Oni venis ĉi tie pilgrimprocesie por petpreĝi Nian Sinjorinon "el la tri Spikoj," ke Ŝi liberigu la landon de tia skurĝo. La morgaŭon la teruraj bestetoj jam ne estis, kaj la dankemaj kamparanoj donace alkročigis al la muro tiun arĝentan muson."

Plaĉis la rakonto al la germano, kiu ekrideante demandis la gvidiston, ĉu la alsacanoj estas tiel mallertaj, ke ili kredas je tiaj malspritaĵoj.

"Tia kredo mortis jam de longe, Sinjoro," simplanime respondis la maljunulo, "alie de longa tempo ni estus pendigintaj ĉi tie etan arĝentan Pruson."

La nazo de l' oficiro plilongiĝis, kaj ĝia posedanto foriris el la Sanktejo grumblante.

Esperantigis D-RO GUST. BUSUTTIL.

La Tragedio de l' Kuracisto.

(*Vera okazintajo*).

Mi intencas rakonti al vi, kara samideanaro, tre strangan, sed efektive estintan okazintajon.

Fremdlandanoj verŝajne ne scias, kio estas malgranda, tre malgranda rusa urbeto sole staranta sur la stepo.

En la urbeto B., kie loĝis 200—300 homoj, staris regimento de l' infanterio kaj...nenio plu... Nek teatro, nek klubo, nek librejo! Plej ŝatata okupo de la inteligenta loĝantaro en B. estis kartludado kaj drinkado. Neniu povis kontraŭstari al jena loka malsano. Multaj novvenintoj provis sin okupi per io, sed la enuo, kruela enuo de malgranda rusa urbeto baldaŭ ilin venkis, kaj post unu aŭ du jaroj ili fariĝis amatoroj de kartludo kaj drinkado.

Unufoje alvenis en B. nova militkuracisto K. kun junia edzino. Doktoro K. estis klera kaj inteligenta homo.

Perdinte, post unu jaro, amegatan edzinon, kiu ne povis toleri la monotonan vivadon en B., li komencis klopoli, ke oni translokigu lin en ian grandan urbon. Sed ĉiuj liaj petoj restis sen respondo.

Li dediĉis sin al la scienco. Sed, malproksime de iu granda urbo, li ne povis trovi la necesajn objektojn por eksperimentado. Kaj li komencis drinki... Antaŭe kun kunuloj, poste — sola. Baldaŭ al li tedis la vulgara drinkado kaj li elpensis ludon — fervoja vojaĝo.

Por la ludo li kunigis seĝojn el la tuta loĝejo, starigas ilin unu post unu, kaj la "vagonaro" estas preta. Poste li alvokas serviston.

Johano, mi forveturas Moskvon "Pretigu la pakajon."

Sen rimarkebla miro Johano kunigas diversajn objektojn kaj metas ilin en sakon. Poste alportas kusenon.

— "La pakajo estas preta, sinjoro!"

— "Bone. Okupu vian lokon ĉe la lokomotivo." La doktoro metas pakajon sur unu seĝon, mem sidiĝas sur alian kaj sin turnas al Johano, kiu rajdsidas sur la unua seĝo — "lokomotivo": — "Ĉu la vagonaro baldaŭ ekmoviĝos?"

— "Ne, sinjoro, oni faris ankoraŭ nur ūnuan signalon al forveturo."

— "Do mi povas engluti unu glason da biero en bufedejo? Bufedejisto — al via loko!"

Johano forlasas la "lokomotivon" kaj kuras al tablo — "la bufedejo."

K. "elvagonigas" kaj malrapide iras en "la bufedejon."

— "Donu al mi unu glason da biero!" — Johano plenigas glason.

— "Mi devas rapidi, la dua signalo estas farita!" Li pagas por la biero kaj paſas al "la vagonaro."

Post nelonge K. anoncas, ke oni faris trian signalon. Johano ellatas lokomotivan fajfalon kaj "la vagonaro" ekmovigas. (Kompreneble, ke nur en la imago de K.).

— "Cu ni baldaŭ alveturos stacion?" — demandas la doktoro.

— "Post unu minuto, sinjoro. — Sekvas lokomotiva fajfado — stacio D—o, la vagonaro staras tri minutojn!" — anoncas Johano.

— "Cu bufedejo ekzistas en jena stacio?"

— "Jes, sinjoro."

— "Alportu al mi unu glason!" ...

— "Da biero?"

— "Kompreneble, ke ne da akvo!"

Johano plenumas la ordonon.

Transveturinte kvar aŭ kvin staciojn, la doktoro elvagonigas kaj anoncas, ke li ne veturos plu, kaj pasigos la nokton en jena stacio. La fidela Johano enlitigas lin, kaj li ekdormas ĝis mateno.

Jus priskribitaj vojaĝoj okazadis preskaŭ ĉiutage, kaj la tuta urbeto konis la fervoj-vojagojn de D-ro K.

Unu fojon, alveturinte la kvinan stacion, la doktoro diris:

— "Johano, la vivo ne estas tiel bona objekto, ke oni nepre vivu?"

Mirigite Johano respondis: — "Mi ne scias, sinjoro..."

— "Mi opinias" — daŭrigis la doktoro, — "ke jam estas sufice por mi vivi. Mi min jetos sub la vagonaron."

Li sin kuſis antaŭ "la lokomotivo" kaj ordonis al Johano, ke li ekveturu.

Sekvis lokomotiva fajfo, la doktoro ektremis kaj restis senmova sur la planko.

Ne ricevinte ian ordonon, Johano demandis la doktoron, kion li faru plu. Nenia respondo sekvis.

La malkrietigita servisto denove ripetis la demandon. Denove silento. Ektuſinte la manon de la doktoro, li terurite desaltis: — ĝi estis malvarma kvazaŭ glacio... D-ro K. estis senviva.

Poste oni klarigis, ke la morto sekvis de kordeſiro...

Lau rusa parolrakonto, N. RUDNICKIJ.



Donation for Convalescent Home Fund.

(See "B.E.", June, p. 109).

Miss M. E. Milner £0 10 6

Al la REDAKTORO de "BRITISH ESPERANTIST."

Mi pensas, ke ni britaj samideanoj ĉiuj devas simpatii kun la peto por la RESANIGEJO POR BELGAJ SOLDATOJ en Suda Francujo. Ni ŝuldas multon al la kuragaj belgaj soldatoj, kaj, kiam ni sciigas, ke la vundita belgo ne povas reiri al sia hejmo, ĉar lia hejmo estas bruligita, ni devas senti, ke estas kaj devo kaj privilegio helpi kiel eble plej multe. Mi esperas, ke multaj respondos la alvokon de Sinjoro Blaise, kaj ke ni baldaŭ kolektos almenaŭ la sumon de £105, tiel ni helpos al la malfeliĉaj soldatoj, kaj ankaŭ al la propagando de Esperanto.

E. FYSON, Taunton.

Esperanto Red Cross Fund.

SEVENTH LIST.

Amount brought forward £800 18 11

DONATIONS (Personal).

Bowen, Mrs., Kuala Kubu, Federated Malay States	0 2 6
A. B. H.	0 10 0
Hodgkinson, Miss Edith, Dunedin, N.Z.	0 5 0
McLaren, R. J., Dunedin, N.Z.	0 5 0
"Sennomo"	0 2 6
Sujadinof, Mrs., Gt. Malvern (4th)	0 5 0
Unwalla, Prof. J. N., M.A., Benares, India	0 5 0

COLLECTIONS.

Brisbane Esperanto Club	3 10 0
(Colonel Plant, £1; A. E. Mason Beatty, 12s. 6d.; Mrs. Monteith, 10s.; Misses Fraser, Sheldon, and Taylor, each 5s.; Misses Roseneder and Morehead, each 2s. 6d.; Messrs. Wirth, Suess, and Kidd, each 2s. 6d. (per A. E. Mason Beatty).	
Kettering Esperanto Group (F. G. Barber), per A. E. Smith	0 5 0
Yorkshire Esperantist Federation	0 7 6
"In memory of the late Edward Parker" (per A. Tuke Priestman) (2nd).	

Total at June 22 £806 16 5



B.E.A. Guarantors, 1915.

Amount brought forward (BRITISH ESPERANTIST, p. 118)	£4180
Barnicoat, D. M., London, N.	10
Beveridge, Miss A. Lois, Fossoway	10
Chitty, Wilfred, Dover	10
Lamb, Dr. William, Hummock Hill, S. Australia	20
Parker, C. H., Auckland, N.Z.	10

The following names were enrolled at the Annual General Meeting in Bath, May 24:—

Boutwood, J. P., J. J., Hastings (total £100)	80
Brown, William, Chorley	20
Brown, Mrs. W., Chorley	10
Clifford, Miss L., Bath	10
Colvill, Capt. A. B., Southsea	10
Coxe, The Hon. H. R. H., London, S.W.	20
Davies, W. E., Treorchy	10
Dinslage, Mrs., Heronsgate	50
Faraker, F. C., London, N.	10
Faraker, Mrs. F. C., London, N.	10
Fyson, Miss Ellen, Taunton	10
Goodliffe, F. A., Letchworth	50
Harvey, William, Edinburgh (total £20)	10
Jayne, E. K., London, S.E. (total £20)	10
Johnston, Harold, London, E.	10
Jones, Miss G. Rhys, Cardiff	10
Marriott, Rhodes, Manchester (total £60)	40
McIntosh, Miss I. E., Edinburgh	10
Megahy, B. P., Fulwood (total £100)	50
Mellor, Miss L. W., London, S.E. (total £20)	10
Merchant, John, Sheffield (total £60)	40
Millidge, Mr. and Mrs. E. A., London, S.E. (total £30)	10
Milner, Miss M. E., Leek (total £50)	30
Mudie, Lieut. H. B., London (total £500)	100
Pitt, Walter, Bath (total £60)	50
Pollen, Dr. John, London, S.W. (total £400)	100
Read, Miss Beatrice, Bath	10

Relf, Ernest F., Teddington.....	£20
Relf, T. J., Edgware.....	10
Robinson, Col. G. S., Eastbourne (total £30).....	20
Shapley, Miss Amy, Exeter.....	10
Sharpe, Richard, Torquay (total £110).....	60
Silcox, Miss L. C., Bath (total £20).....	10
Simpson, Thomas, London, N.E.....	10
Smith, Mrs. F., Bexhill-on-Sea.....	20
Spackman, Herbert, Corsham.....	10
Strong, F. J., Staverton (total £50).....	20
Travis, G. Nelson, Bognor.....	10
Vacher, Miss A. K., London, N.....	10
Whitaker, John, Bath (total £20).....	10
Williams, Aneurin, M.P., Hindhead.....	10
Wilson, John, Leek (total £30).....	10
Wilson, Mrs., Leek (total £20).....	10
Wood, Miss F. W., Wakefield.....	10
Worthington, Guy J., Leek.....	10
Young, Miss C., Gilnockie, London, S.E.....	20
<hr/>	
Total at June 24	£5310

* * * *

The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Dr. H. W. ANDERSHOU, 14, Stanley-gardens, Belsize Park, London, N.W.; J. M. D'COSTA, Em Sangolda, Vancavado, Bardez, Goa, India; P. FELIX FERNANDO, Maggona, Ceylon; FRANK T. MAJOR, “Rosalie,” Witham-road, Spring Grove, Isleworth, Middlesex; ERNEST F. RELF, 37, Clarence-road, Teddington, Middlesex; V. A. STEWART, Quartermaster-General in India's Office, Army Headquarters, Simla, India.

* * * *

Council and Executive Meetings.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, July 19, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

AGENDA.

Consideration of the duties of Sub-Committees, in accordance with the resolution of the Council at Bath.

Financial Statement.

Discuss proposition from Mr. Merchant, that a new Honour be created, in the form of a medal, in recognition of long or special service in the cause of Esperanto.

Correspondence and other Business.

Councillors unable to attend, or members who wish to express an opinion on any item in the Agenda, are invited to send in their views to me, in order that they may be submitted to the meeting.

E. A. ALLSOP, Acting Secretary.

* * * *

Annual General Meeting, 1916.

Invitations for the next Annual General Meeting of the “B.E.A.” from groups desirous of holding a congress in their locality should be sent in to the Secretary before September 20.

* * * *

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencej por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

591. Maggona, Ceylon.—S-ro P. Felix Fernando, Government Surveyor, deziras korespondadi per ilustritaj p.kartoj kun belgaj, francaj kaj Holandaj gesamideanoj.

592. Moskvo (Rusujo).—S-ro A. Prager, Pošta Kesto 409, inter. P.M.P.I. fotograf. k.t.p. Deziras negoci fotografajn platojn, paperojn, hemiajojn aparatojn, k.t.p.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, June 21, 1915, at 6.30 p.m. Present: Messrs. P. Blaise, C. A. Fairman, G. Mercer Hollis, B. E. Long, W. Phillimore, F. M. Sexton, Dr. John Pollen, Misses M. L. Blake, L. S. Grant, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, E. O'Brien. In Attendance: The Acting Secretary.

Chairman.—Dr. Pollen was elected Chairman of the meeting.

Minutes.—The Minutes of the previous meeting were read, approved, and signed.

The Chairman reported upon the success of the Congress at Bath and referred to the spirit of enthusiasm which pervaded the meetings, especially with regard to the Guarantee Fund and to the gratitude due to the organisers of the Congress.

Annual General Meeting, 1916.—Some discussion arose as to the advisability of holding the next Annual General Meeting in London; it was, however, decided to leave the matter open and to publish in the July “B.E.” a special paragraph to the effect that invitations for the next Annual General Meeting may be sent in up till September 20.

Sub-Committees.—It was decided to postpone the consideration of the questions regarding the retention and definition of the duties of the various Sub-Committees until the next meeting of Council.

Finance.—The Hon. Treasurer reported that there were balances of £44 8s. 6d. and £150 on Current and Deposit Accounts respectively, and that the balance of the Red Cross Fund amounted to £14 2s. 2d. He further reported upon the success of the Bath Congress as regards the Guarantee Fund, promises to the extent of £1,200 having been received in a few minutes at the Annual General Meeting.

Honours List.—The Chairman read a letter from Mr. Merchant suggesting the creation of a new Honour, in the form of a medal, in recognition of long or special service in the cause of Esperanto. After some discussion it was decided that this subject should form one of the items for consideration in the Agenda Paper for the next meeting, due notice being given in the “B.E.”

Councillors.—It was reported that Mr. Epstein had joined the M.T. Section of the A.S.C., and had been promoted to Lance-Corpl., and that he regretted his inability to be present at the meeting.

It was reported that as Mr. Archibald Sharp had been elected to two Offices on the Council, he had given up his Ordinary Councillorship, and that Mr. Blackett, the next in order on the list as a result of the Ballot, thus became an Ordinary Councillor.

Propaganda in India.—It was reported that a letter in the Urdu paper *Desh* had brought 100 enquiries from business people in the Punjab district. Dr. Pollen read a few of these letters, and promised to write to the paper mentioned. It was considered advisable to follow up the effort by putting as many of the enquirers as possible in touch with one another.

* * * *

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

593. Bobrujsk (Minsk, gub.) Ruslando.—S-ro B. Poplavskij, Muravjevskaia ul. 896, deziras konstantan korespondadon kun ĉiuj landoj kaj interŝangas p.k.

594. Sherbro (West Africa).—S-ro George E. Greenyer, c/o P. & B., deziras korespondadi kun alilanduloj.

595. London, W. (Anglujo).—S-ro Emlyn Evans, 8, Cavendish Buildings, Oxford-street, deziras korespondadi per ilustritaj pošt-kartoj kun ĉiuj, ĉie. Ciam respondos.